# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

4 1986





*Orkideo Carter*

Foto de **GONG JI**

# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

4 (331) 1986

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio


## Enhavo


Profunde ni funebras pri s-ano Hujucz . . . . . 2

Adiaŭo al la restaĵoj de s-ano Hujucz en Pekino . . . . . 4

Kondolencaj telegramoj kaj letero . . . . . 5

La vivo de maljunuloj en ĉinaj urboj . . . . . 13

Sekreto de longviveco . . . . . 15

Feliĉaj maljunuloj . . . . . 17

Ekonomiaj reformo kaj disvolviĝo en la ĉina kamparo . . . . . 6

Guhaj, perlo ĉe la Suda Ĉina Maro . . . . . 20

TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (15): Pri moroj en Tibeto . . . . . 49

POR LA 71-A UK: Ĉu vi deziras scii pri la aranĝoj de loĝado kaj ekskursoj dum la kongreso? . . 40

En kaj ekster la Internacia Seminario de Bad Saarow . . . . . 24

POR KOMENCANTOJ: Rivereto; Herbeto . . . . . 27

ESP-NOVAĴOJ . . . . . 28

Bela mozaiko de la kantona gejunula vivo . . . . . 10

POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (II) . . . . . 68

Fosilioj de Ŝanŭang (Bildoserio) . . . . . 38

Enigmo de la subtera palaco de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio . . . . . 60

VOJAĜO TRA ĈINIO: Nova turisma urbo Ĉengdu . . . . . 32

La Monda Virina Flugpilka Konkurso por Hitaĉi-pokalo . . . . . 30

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj pladoj . . . . . 66

EL REALA VIVO DE ĈINIO: Pekin-gustaj manĝaĵoj . . . . . 56

AMUZO . . . . . 69

KURANTAJ AFEROJ . . . . . 9, 64

ĈINLINGVA KURSO . . . . . 71


SUR LA KOVRILO: Ĉiamverda pino — Foto de **LI ĈUNGENG**

INTERNE DE LA KOVRILO: Orkideo Carter — Foto de **ĜONG JI**

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Kolorigita argila dancisto — Teksto de **FANG GŬOĜIN**, Foto de **HU ĈUJ**

SUR LA DORSKOVRILO: Mandarenaj anasoj sin distrantaj sub lotusfloroj (Ĉinstila pentraĵo)
de **JU ĜIĜEN** kaj **LIŬ LIŜANG**


| JARABONTARIFO | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | Britio | £ | 8.00 | Japanio | Yen | 3000 | Svisio | SF | 25.00 |
| Aŭstralio | $A | 14.00 | Finnlando | Fmk | 64.00 | Jugoslavio | Din. | 500 | Usono | US$ | 12.00 |
| Aŭstrio | Sch | 200 | Francio | FF | 90.00 | Nederlando | Gld. | 34.00 | Kanado | Can$ | 13.00 |
| Belgio | BF | 550 | Hispanio | Ptas | 1200 | Nov-Zelando | NZ$ | 20.00 | | | |
| FR Germanio | DM | 30.00 | Italio | Lit | 18000 | Portugalio | Esc | 1100 | | | |

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US$ 6.50

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Profunde ni funebras pri s-ano Hujucz



*S-ano Hujucz*

Kun profunda malĝojo ni informiĝis, ke s-ano Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, aganta prezidanto de la Ĉina Demokratia Ligo, fidela komunisma batalanto kaj fama politika aktivulo de Ĉinio, forpasis pro malsano la 16-an de januaro 1986 en Pekino.

Kun granda malĝojo ni funebras pro lia forpaso kaj esprimas nian koran kondolencon al liaj familianoj en la nomo de la Esperanto-ligoj kaj -asocioj de la ĉinaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj la ĉinaj esperantistoj.

La forpaso de s-ano Hujucz estas grandega perdo ne nur por la ĉina popolo, sed ankaŭ por la ĉina Esperanta laboro.

S-ano Hujucz estis pioniro de la ĉina Esperanta laboro. Jam en sia juneco li sin dediĉis al propagando kaj disvastigo de Esperanto, per Esperanto konigis al Ĉinio la vivon kaj batalon de la sovetia popolo kaj elesperantigis por la ĉina popolo literaturajn verkojn de malgrandaj nacioj kaj progresemaj ŝtatoj, kio havis pozitivan influon sur la ĉinan novan literaturon. Li iniciatis revolucian Esperantan organizon kaj prezentis la sloganon "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio", intime ligis la ĉinan Esperantan laboron kun la revolucia batalo de la ĉina popolo kaj faris elstarajn kontribuojn al la liberigo de la ĉina popolo.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio li iniciatis la Ĉinan Esperanto-Ligon kaj funkciis kiel ĝia prezidanto ĝis sia lasta horo. Li iniciatis ankaŭ la revuon "El Popola Ĉinio", kiu poste fariĝis organo de la ligo, Esperantan elsendon al la mondo kaj la societon "Amikoj de Esperanto". Dum jardekoj li ne ŝparis sian forton por disvastigi Esperanton en Ĉinio, ke la ĉina Esperanta laboro havis nesubtakseblan influon sur la internacian Esperanto-movadon kaj multe kontribuis por akceli la amikecon kaj interkompreniĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj fortigi la internacian kulturan interŝanĝon.


En 1963 vicĉefministro Ĉen Ji proponis okazigi universalan kongreson en Ĉinio. Por tio Hujucz aktive laboris kaj en 1982 faris signifoplenan decidon okazigi la 71-an UK en julio kaj aŭgusto 1986 en Pekino. Li tre zorgis pri la prepara laboro de tiu kongreso. En la jarfino de 1985 li demandis nin pri la detaloj kaj instrukciis, ke ni nepre sukcesigu la kongreson.

Hujucz faris meritojn neforviŝeblajn kaj ĝuis altan prestiĝon en la tutmonda esperantistaro. En 1984 UEA elektis lin kiel membron de sia Honora Patrona Komitato, kio estas la plej honora ofico por la mondaj esperantistoj. La bedaŭrinda forpaso de Hujucz estas granda perdo ankaŭ por ili.

Sen Hujucz ne estus la hodiaŭa sukceso de la ĉina Esperanta laboro. Lia forpaso perdigis al ni la plej respektindan kaj plej eminentan gvidan-

*Hujucz (la tria de maldekstre) interparolas kun prezidanto Maŭ Zedong dum iu kunveno en 1956.*





*Membroj de la Ĉina Ligo por Defendo de Popolaj Rajtoj Hujucz (la dua de maldekstre), Song Ĉingling (dekstre), edzino de Sun Jatsen, kaj la granda ĉina verkisto Lusin (maldekstre) en 1932*

ton de nia Esperanta laboro kaj tre doloris la esperantistojn de la tuta lando.

Ni devas turni la malĝojon en forton, realigi lian neplenumitan deziron, daŭrigi la ĉinan Esperantan laboron komencitan de li kaj sukcesigi la 71-an UK laŭ nia eblo.

Eternan gloron al s-ano Hujucz!

Societo "Amikoj de Esperanto"

Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Ĉina Esperanto-Eldonejo

Redakcio de "La Mondo"

La 17-an de jan. 1986



*Adiaŭo al la restaĵoj de s-ano Hujucz*

# Adiaŭo al la restaĵoj de s-ano Hujucz en Pekino

S-ano Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, aganta prezidanto de la Ĉina Demokratia Ligo kaj fama politika aktivulo, forpasis 90-jara pro malsano la 16-an de januaro 1986 en Pekino. La ceremonio por adiaŭi liajn restaĵojn okazis posttagmeze de la 22-a de januaro en Pekino.

En la majesta halo de la Babaŭŝan-a Revolucia Tombejo staris florkronoj kun nigraj rubandoj. La restaĵojn de Hujucz ĉirkaŭis verdaj cipresoj kaj freŝaj floroj.

La ĝenerala sekretario Hu Jaŭbang, ĉefministro Ĝaŭ Zijang kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj ŝtato partoprenis en la ceremonio por profunde funebri pri li.

Kiel unu el la pioniroj de la progresaj kultura kaj eldona aferoj de Ĉinio, Hujucz sin dediĉis al la popola afero, senlace laboris la tutan vivon kaj gajnis respekton de la publiko. Pli ol 600 funebrantoj kun blanka floro sur la brusto venis unuj post aliaj al liaj restaĵoj por adiaŭo.

UEA kaj aliaj Esp-organizoj kaj gesamideanoj sendis kondolencajn telegramojn al la Ĉina Esperanto-Ligo.

Hujucz naskiĝis en Ŝangju, Ĝeĝjang-provinco. Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio li longe okupiĝis pri la kultura kaj eldona laboroj kaj senlace batalis kontraŭ imperiismo kaj reakciaj fortoj.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko li laboris kiel ĉefredaktoro de *Guangming Ribao* (Ĵurnalo *Lumo*), estro de la Eldona Administracio de Ĉinio, vicestro de la Komisiono por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo, vicministro de la Kultura Ministerio, vicestro de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, membro de la Konstanta Komitato de la Unua ĝis la Kvina Tutlandaj Popolaj Kongresoj, membro de la Tutlanda Komitato de la Dua ĝis la Kvara Ĉinaj Popolaj Politikaj Interkonsiliĝaj Konferencoj kaj vicprezidanto de la Kvina Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Li faris elstarajn kontribuojn al ĵurnalismo, eldonado, reformo de la ĉina skriba lingvo, eksteraj aferoj, firmigo kaj disvolvo de la patriota unuecfronto kaj disvastigo de Esperanto.

# Kondolencaj telegramoj kaj letero

ĈEL Roterdamo, 1986-01-20

Kun profunda doloro ni eksciis, ke ĉesis bati la nobla koro de Hu Yuzhi, eminenta ĉina revoluciulo kaj gvidanto, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, membro de honora patrona komitato de Universala Esperanto-Asocio. Lia forpaso senigas nian movadon de ĝia plej grava adepto en la tuta historio de Esperanto en Ĉinio. Hu Yuzhi ne nur agadis kaj gvidis vialandan movadon dum pli ol sepdek jaroj, sed li ankaŭ brave protektis ĝin kiam tio necesis. Ni petas vin konscii, ke la tuta membraro de UEA dividas vian grandan perdon kaj eterne gardos la inspiran memoron pri la brila personeco de la forpasinto.

**Gregoire Maertens,** prezidanto de UEA

Ĉina Esperanto-Ligo Pécs, 1986-01-18.

Karaj Gesamideanoj,

Kun granda tristo mi aŭskultis la sciigon de Radio Pekino pri la forpaso de s-ano Hu Yuzhi, prezidanto de ĈEL, membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Lia morto estas perdo ne nur por la ĉinaj esperantistoj sed ankaŭ por la internacia movado. Vi bonvolu akcepti mian tutkoran kondolencon.

Sincere via:

**Flóra Szabó-Felsö**, ĝen. sekr. de UEA

Ĉina Esperanto-Ligo 1986-01-20

Kun granda bedaŭro kaj profunda malĝojo mi sciiĝis pri la forpaso de nia tre estimata sinjoro Hujucz, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo ekde ĝia fondiĝo kaj iniciatinto de "El Popola Ĉinio".

Ni ĉiam sentis grandan honoron kaj instigon pri la fakto, ke ni povas intime nomi tiel eminentan personon kiel lin "nia respektata kaj amata pioniro".

Estas vere korŝire por ni, ke lia vivo estis bedaŭre forprenita, ĝuste antaŭ la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-somere en Pekino. Mia arda espero tiam revidi lin fariĝis vana.

Sed tamen lia senmezure granda kontribuo al esperantaj aferoj kaj lia ĉarma personeco freŝe vivos en mia memoro por eterne.

Reprezentante Japanan Esperanto-Instituton kaj ankaŭ japanan esperantistaron, mi esprimas mian plej sinceran kondolencon al vi pri la forflugo de unu el la plej brilaj steloj en la tutmonda Esperantio.

Mi elkore preĝas, ke lia nobla animo restu en paco kaj gvidu nin ĉiujn ĉiam en spirito.

**Yukiko Isobe**,
Cefdirektoro de
Japana Esperanto-Instituto

Ĉina Esperanto-Ligo 1986-01-18

La sciigon pri la forpaso de la estimata samideano Hujucz ni ricevis kun profunda malĝojo.

La granda pioniro preskaŭ jam duonlegenda), kaj decida gardanto de l' ideo de l' neŭtrala lingvo jam ne plu estas inter ni.

Antaŭ ol mencii liajn ŝtatservajn meritojn, la japanaj grandaj ĵurnaloj unuanime raportis, ke li estis "konata esperantologo".

Ni elkore kondolencas ĉinan esperantistaron, kies fierinda "patro" li fakte estis!

Nagoja Esperanto-Centro

ĈEL 1986-01-18

Elkore funebras forpason de glora majstro Hujucz.

**Tokuda**

ĈEN ŜJAŬĜJUN:

# Ekonomiaj reformo kaj disvolviĝo en la ĉina kamparo


La grena problemo, kiu ĉagrenis ĉinojn en multaj jaroj, nun fundamente estis solvita. En Ĉinio la pli ol miliardo da loĝantoj havas meznombre po ĉ. 400 kilogramojn da greno. Kvankam tio ankoraŭ estas kompare malalta konsuma nivelo, tamen Ĉinio vivtenas sian loĝantaron, kiu konsistigas 25% de tiu de la mondo, per sia agraro, kiu nur konsistigas 7% de tiu de la mondo. Tio estas rimarkinda por la homaro.

La disvolviĝo de grena produktado en Ĉinio trapasis zigzagan vojon. En ĉ. 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, greno nur kreskis je 3.5% ĉiujare. En 1978, ĉiu loĝanto nur havis 318.5 kilogramojn da greno. La problemo pri la vivtenado de plejparto de la kamparanoj estis ne solvita.

Poste okazis granda ŝanĝiĝo. La ŝlosilo de la ŝanĝiĝo estas, ke ekde 1979 Ĉinio ellaboris serion da efikaj kamparaj politikoj kaj reformaj metodoj, inter kiuj la ĉefa estas praktiki familian respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado. Tiu sistemo kun premiso de senŝanĝa ŝtata posedo de la agraro anstataŭigas la kolektivan ununuran administradon per kamparana individua administrado aŭ grupa administrado kontraktita kun la kolektivo. Tiu sistemo evitas antaŭan egalismon en distribuado kaj troan koncentriĝon en administrado kaj plene disvolvis aktivecon de la kamparanoj. Por kuraĝigi kamparanojn produkti pli da greno, ekde somero de 1979 la prezo de greno rekvizicie aĉetata de la ŝtato altiĝis je 20%, tiu de greno ekster la plano altiĝis je 50% sur tiu ĉi bazo. Pro praktiko de la politiko de altigo de grena aĉetprezo, enspezo de la kamparanoj ĉiujare plimultiĝas je kelkaj miliardoj da juanoj. Kvankam en la unuaj 5 jaroj de la oka jardeko oni plivastigis kulturan areon de ekonomiaj plantoj kaj malmultigis tiun de grenaj plantoj je 8 milionoj da hektaroj, tamen la totala grena produktokvanto de la tuta lando meznombre kreskis je 23.047 milionoj da tunoj ĉiujare, nome triobliĝis la kresko kompare kun la meznombra kresko de la antaŭaj 30 jaroj.

Post la unua reformado kvankam la ĉina kampara ekonomio havis kompare grandan disvolviĝon, tamen ankoraŭ estis neharmoniaj fenomenoj en agrikultura produktado, merkata provizado kaj aliaj flankoj. La ĉefa problemo estas ke la disvolviĝo de diversaj produktoj en la kamparo estas neekvilibra, kulturado disvolviĝis pli rapide, dum brutobredado, fiŝbredado k. a. disvolviĝis ne tiel rapide, ke ili ne povis kontentigi la socian bezonon, kaj la kapablo por prilaboro, konservo, freŝteno kaj transportado de agrikulturaj produktaĵoj estis kompare malforta. Iuj agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj estis malaltkvalitaj kaj la specoj monotonaj, ekzemple grasaj porkoj estis multaj, sed la negrasaj malmultaj, long-grajna rizo estis multa, sed bonkvalita rond-grajna rizo mal-

*Bovinejo de Ŝŭangĉjaŭ en Pekino*



multa. La preza sistemo ankoraŭ ne estis reguligita. Ekzemple la preza diferenco inter iuj industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj kaj tiu inter iuj produktaĵoj de agrikulturo, brutobredo kaj akvoprodukto estis ne raciaj. En la unua reformado oni nur altigis aĉetan prezon de iuj ĉefaj agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj, sed ne altigis la vendan prezon. Pro tio la ŝtato ĉiujare devis elspezi grandan financan subvencion. Cetere oni ne praktikis la principon difini prezon laŭ la kvalito de produktaĵoj. Krome la disvolviĝo de kampara ekonomio de diversaj lokoj estis neegala. Iuj lokoj ankoraŭ ne solvis la problemon de vivtenado de la kamparanoj.


Laŭ la supre menciitaj kondiĉoj, ekde 1985 Ĉinio faris la duan reformadon al la kampara ekonomio, kies ĉefaj enhavoj kaj metodoj estas jenaj:

Sub la premiso de garantiata grenproduktado, oni pluapaŝe reguligas la produktan strukturon de kamparo kaj akcelas harmonian disvolviĝon de agrikulturo. Post la unuapaŝa reguligado antaŭ kelkaj jaroj iom ŝanĝiĝis la produkta strukturo de la ĉina kamparo. Ekzemple la pocentoj de kulturado malleviĝas kaj tiu de aliaj diversaj okupoj leviĝas; la kultura areo de tritiko, rizo kaj aliaj delikataj grenoj iom plimultiĝis, tiu de maizo, sorgo, batato kaj aliaj maldelikataj grenoj iom reduktiĝis. Sed tiu ŝanĝiĝo ankoraŭ estas negranda. En la dua reformado oni racie aranĝas la pocentojn de grena, ekonomia kaj furaĝa plantoj laŭ la bezono de en- kaj eksterlanda merkatoj. Samtempe oni racie aranĝas la pocentojn de plantspecoj ĉefe por altigi kvaliton kaj produktovaloron de produktaĵoj. Nun en diversaj lokoj oni jam rekomendis produkti la fame konatan rizon, ekzemple la speciale bonkvalita glueca rizo "Junŭo", kiu historie estis tributo al imperiestra palaco, aroma rizo "Daŭŝjang Ŝili", la feroza glueca rizo "Jaŝŭenŭo" k. a. Oni povas diri ke ŝanĝo de pena disvolvo de produktokvanto de greno al penado por altigi ĝian kvaliton estas la nova informo de la grena produkto de Ĉinio.

Nun la ŝtato postulas ke diversaj lokoj plene kaj racie utiligu diversajn naturajn riĉfontojn; pli rapide disvolvu forstokulturon, brutobredadon kaj fiŝkaptadon; aktive starigu furaĝprilaborejon por garantii la disvolviĝon de brutobredado; aktive

*Riĉa rikolto de greno en Uŭej-gubernio, Anhuj-provinco. Jen kamparanoj liveras sian kontingenton da greno al la ŝtato.*






bredu negrasajn porkojn, viandajn bovojn, laktajn bovojn, ŝafojn, kokojn, anserojn, anasojn kaj aliajn brutojn kaj kortobirdojn kaj disvolvu akvoproduktaĵojn por produkti pli da ovoj, lakto, viando kaj fiŝoj kaj paŝon post paŝo plibonigi manĝaĵstrukturon de la loĝantaro.

Krome la ŝtato ankaŭ kuraĝigas kamparanojn starigi malgrandan minejon kaj prilaborejon kaj fari komercadon, transportadon, malgrandan energikonstruadon k. a. Laŭplane, ĝis la fino de la kuranta jarcento laborfortoj okupiĝantaj pri kulturado de plantoj, ne superos trionon de la totala laborforto en la kamparo, la aliaj du trionoj okupiĝas pri vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj, forstokulturo, brutobredado, fiŝbredado kaj terciara industrio.

Ĉinio abolos la politikon de monopola aĉeto de agrikulturaĵoj, kaj sub la direktado de la ŝtata plano, oni plivastigos la merkatan reguligadon kaj liberigos la prezon de agrikulturaĵoj. De 1954 greno, kotono kaj oleaj plantoj en Ĉinio estis monopole aĉetitaj de la ŝtato, kaj aliaj agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj estis rekvizicie aĉetitaj de la ŝtato. Tiu metodo iam ludis aktivan rolon, kiam la produktaĵoj estis ne sufiĉaj, subtenis industrian disvolviĝon kaj garantiis fundamentan bezonon de la popola vivo, sed ankaŭ kaŭzis multajn maloportunojn, ekzemple: la ŝtato aĉetis kiom produktis la kamparanoj; la konsumantoj ricevis kiom la ŝtato provizis, kio estigis kontraŭdirojn inter produkto kaj konsumado, inter produkto kaj bezono de la merkato. Kun forpaso de tempo la ekonomia funkcio tagon post tago stagnis, kaj la produktado ne povis disvolviĝi. Tial ekde 1985 krom iuj specoj de produktaĵoj, la ŝtato ne plu monopoligas la agrikulturajn produktaĵojn, sed ĝi alprenis metodojn de mendo kaj aĉeto per kontrakto. Ekzemple la komercaj branĉoj kontraktas kun kamparanoj pri aĉeto de greno kaj kotono antaŭ semado, la superfluaj greno kaj kotono povas esti libere vendataj en foiro. Ankaŭ la devigita liverado de vivaj porkoj, akvoproduktaĵoj kaj legomoj al la grandaj kaj mezaj urboj estas paŝopostpaŝe nuligita kaj estas permesite libere aĉeti kaj vendadi ilin en foiro. Sub tiu kondiĉo la ŝtata komerco aktive partoprenos en administrado de merkato por teni racian prezon de varoj kaj protekti la intereson de la konsumantoj.


La unua reformado komenciĝis en la ekonomie postiĝintaj regionoj, poste disvastiĝis en aliaj regionoj. La dua reformado komenciĝis en la



kompare prosperaj marbordaj regionoj, por ke tieaj informo, tekniko, kapitalo kaj fakuloj paŝon post paŝo disvastiĝu kaj enfluu en la landinternon. Tio favoras al ekspluatado de abundaj naturaj riĉfontoj kaj laborfortoj de la landinterno kaj samtempe kuraĝigas kamparanojn eniri en urbon starigi la terciaran industrion.

Kun la profundiĝo de la reformado de la kampara ekonomia strukturo Ĉinio ankaŭ direktis sian atenton al aktiva ekonomia kunlaboro kun fremdlandoj en tiuj flankoj por rapidigi la modernigon de agrikulturo, brutobredado kaj fiŝbredado de Ĉinio.

Nun la Ministerio de Agrokulturo, Brutobredo kaj Fiŝbredo de Ĉinio jam starigis rilatojn de ekonomia kunlaboro kaj teknika interŝanĝo kun pli ol 80 landoj kaj regionoj de la mondo, faris pli ol 100 temojn de ekonomiaj teknikaj kunlaboroj tra multaj kanaloj, la fremdaj investoj subskribitaj aŭ kontraktitaj atingis 670 milionojn da usonaj dolaroj, fremdaj kapitaloj senpere enkondukitaj de la fakoj de agrokulturo, brutobredo kaj fiŝbredo de diversaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj atingis 450 milionojn da usonaj dolaroj. Ĉinio unuapaŝe planas, ke en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990), la sumo de fremda kapitalo plimultiĝos je pli ol 50% ol tiu de la antaŭa kvinjara plano.



*Fiŝista loĝejo en Baŭ'an-gubernio, Gŭangdong-provinco*



*Vestofarejo en la ĉina kamparo produktas ĉemizojn por eksportado.*

## KURANTAJ AFEROJ

### BELORUSA ŜTATA POPOLA ĤORO EN ĈINIO

La 70-membra Belorusa Ŝtata Popola Ĥoro prezentis en Ĉinio meze de decembro, 1985. Tio estis la dua granda artista trupo vizitanta Ĉinion, post la Moskva Klasikbaleta Trupo.

Post sia fondiĝo en 1952 ĝi prezentis pli ol 3 000 fojojn en Sovetunio kaj aliaj landoj kaj gajnis aplaŭdon de diverslandaj spektantoj. Ĉifoje ĝi prezentis riĉajn programerojn, inter kiuj estis "Katjuŝa" k.a. multe kantataj de la ĉinaj gejunuloj jam en la 50-aj jaroj. Ĝi estas varme aplaŭdata de la ĉinaj spektantoj.

### POLA EKSPOZICIO DE MODERNAJ PENTRAĴOJ EN PEKINO

Laŭ la plano de la kultura interŝanĝo de Ĉinio kaj Pollando, la pola ekspozicio de modernaj pentraĵoj okazis decembre de 1985 en la Pekina Belarta Halo.

En la ekspozicio videblis 140 verkoj de 35 pentristoj. La pentraĵoj plejparte estas konservataj en la Pola Ŝtata Muzeo kaj iliaj aŭtoroj estas mondfamaj pentristoj. La verkoj kun vasta temo spegulas de malsamaj flankoj la amon de la pentristoj al la patrujo kaj paco kaj ilian prikanton al siaj popolo kaj laboro.

### ĈINAJ LUDISTOJ GAJNIS TITOLON DE LA MONDA VOLANA GRANDPREMIO

Decembre de la lasta jaro en la finalo de la monda volana grandpremia konkurso de 1985 okazinta en Tokio ĉinaj volanistoj Han Ĝjan kaj Li Lingŭej gajnis ĉampionecojn viran kaj virinan.

Tio estis la plej grava el la 18 grandpremiaj konkursoj en 1985. Han Ĝjan venkis aŭstralian sportiston Sze Yu per 15:6 kaj 15:3 kaj gajnis la viran solludan ĉampionecon.

La virina solluda finalo okazis inter du ĉinaj volanistinoj. Li Lingŭej venkis Han Ajping per 11:3 kaj 11:3 kaj fariĝis ĉampionino.

# Bela mozaiko de la kantona gejunula vivo

de **GE ŜI**

En la tempo, kiam en Pekino ankoraŭ tiranis vintra frosto, mi veturis al Kantono, kie karesis la varma suno. Tie mi tuj fariĝis objekto de atento pro mia vesto. Mia nigra ledjaketo vere malakordis kun la tieaj loĝantoj, kiuj preskaŭ ĉiuj portis maldikan veston, spirantan refreŝigecon. Precipe ĉarmaj estis la vestoj de la gejunuloj. Malofte vidiĝas samfasonaj vestoj surstrate. Antaŭ mia atingo, oni diris al mi, ke la Kantonaj vestoj povas rivali eĉ kun tiuj de Hongkongo kaj Japanio. Eble mi devus konsenti.

En la sekva tago mi venis al la plej granda vendejo de Kantono — Servejo de la Suda Domego. Tie svarmis klientoj. Vere gaja spektaklo. Vendistino Ĝang diris al mi, ke tie vendiĝas miloj da specoj da varoj, kiuj havas grandan debiton. Tre rapide elvendiĝas la vestoj ŝatataj de aktoroj kaj vestomodeloj. En la interparolo kun aĉetantaj junuloj mi trovis, ke en Kantono ne furoras la eŭrop-stilaj kostumoj kiel en aliaj urboj, la tieaj gejunuloj preferas nov-fasonajn kaj belaspektajn vestojn sportistajn, jaketojn kaj diversajn jupojn. Laŭ ili tiaj vestoj elspiras junan viglecon kaj belecon. Tio jam fariĝis moro en Kantono. Iuj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj eĉ okazigis sian propran vest-konkurson por kuraĝigi la gejunulojn beligi sian vivon kaj levi ties estetikan aprecon.

Estas ĉarma la Kantona nokto. Tetrinkejoj, drinkejoj, magazenoj, teatroj, parkoj, balhaloj kaj vendejoj entreprenataj de privatuloj ĉiuj estas ornamitaj per neonaj lampoj. Sub la gembrila lamplumo viglas junaj vizaĝoj en la homtorentoj. La Kantona Kultura Parko ĉe la bordo de la Perla Rivero estas centro de la nokta vivo. Tie ĉiuhore oni elvendas pli ol mil biletojn, duoble pli kostajn ol tiuj en la tago. En la domo kaj subĉiela teatro samtempe prezentiĝas Gŭangdong-aj operoj kaj leĝera koncerto. La ekspozicioj de libroj, floroj, fotoj kaj vestoj bone influis la psikon de la gejunuloj per siaj okulplaĉaj eksponaĵoj. La muzika tetrinkejo, iam aspirita de la landinternaj gejunuloj, verŝajne jam elmodiĝis. Ĉe ĉiu tablotenisa tablo kolektiĝis multaj atent-streĉitaj knaboj. De koncernaj flan-



*Malgranda koncerto de junaj laboristoj*



*En la salono de fremdlingva konversacio en la Kultura Domo de Kantonaj Junuloj*

koj mi informiĝis, ke la te-trinkejoj depresiiĝis ankaŭ pro tio, ke la amuz-maniero de la geknaboj aliiĝis. Antaŭe ili sole spektis prezentadon, sed nun ili preferas mem ludi. La gejunuloj organizis siajn orkestron, ensemblon k. a. Iuj unuoj okazigis gejunulan prezentadon. La Kantona Publikutila Buroo okazigis dufoje gejunulan koncerton, kiun partoprenis unuafoje 60 homoj, sed post unu jaro la nombro superis 300. El tio klare vidiĝis, kiel forte la gejunuloj volas kulturi la talenton kaj sin montri pere de la arta prezentado.

La enketo montris, ke en la amuzejoj plejparto estas junaj laboristoj. El la junaj gelaboristoj la amuzemaj konsistigas nur 35.5%, dum la ceteraj ŝirmate de la nokta vualo sin malsoifigas en la maro de scioj. Iuvespere mi vizitis la Ŝinhŭa-an Postlaboran Fremdlingvan Lernejon, situantan en la komerca kvartalo. La lernejo de sia fondiĝo en 1980 kreskas jaron post jaro kaj nun havas 15 kursojn kun pli ol 700 kursanoj. Nun en la lernejo krom la fremdlingva kurso ankoraŭ funkcias kontista kurso kaj kurso pri mekanika desegnado. La kursoj estas gvidataj de instruistoj de altaj lernejoj kaj esploristoj de scienc-esploraj institucioj. La kursanoj venis de diversaj socitavoloj, inter ili estas laboristoj, kadroj, hotelaj kelneroj, turismaj servistoj, revenintaj elmigrintaj ĉinoj kaj privataj entreprenistoj. Statistiko montris, ke nun en diversaj vesperaj lernejoj studas 400 000 gejunuloj, t. e. 52.6% de la totala nombro de la Kantonaj gejunuloj. Tio tamen ne inkluzivas la lernantojn en la fakaj help-kursoj, kompletigaj kursoj kaj en propraj hejmoj. Nun ilia ŝato etendiĝas iom post iom de sola distrado al praktikado (tajlorado, riparo de elektraj aparatoj, fotado, flor-kulturado, medicino kaj meblofarado), arto (muziko, belarto, literaturo, dramo, filatelio) kaj scioj (fremdaj lingvoj, naturaj sciencoj, historio, ekonomio kaj politiko).

Tiu tendenco estas kaŭzita ne de la registara alvoko, nek de la volo de iu ajn estro, sed de ilia konscio pri la nova situacio de la ekonomia reformado. Ekde praktiko de la pordmalferma politiko en Kantono, la tiea socia vivo multe ŝanĝiĝis en diversaj kampoj. Estas reformita la sistemo pri akcepto de laboristoj kaj kadroj. Nun malaperis la fera rizbovlo — sekure enspeziga laboro. En la konkurado venkas ĉiam la eminentaj kaj malvenkas la malbonaj. Nun la gejunuloj ne plu maltrankvilas pri tio, ĉu la propra talento povas disvolviĝi, sed pri sia malalta kapablo, el kio eble rezultos maldungo, tial ili dediĉis grandan energion al la studo. Eĉ la diplomiĝintoj el superaj lernejoj penas akiri al si novajn sciojn. Statistiko montris, ke en Kantono inter la 1.8 milionoj da laboristoj kaj oficistoj 1.17 milionoj studas en diversspecaj kaj diversformaj kursoj, inkluzive de gejunuloj de privataj entreprenoj. En la urbo troviĝas pli ol 100 000 privataj laborantoj, el kiuj 60% estas junaj. Ĉiutage, kiam falas la nokta krepusko, venas la oraj horoj por ilia negoco, sed la ambiciaj gejunuloj preferas studi en la lernejo ol ĉasi profiton en tiuj horoj.

En mia plurtaga vizitado mi trovis, ke la plej granda ŝanĝiĝo en Kantono estas tiu de la konceptoj de la gejunuloj. Tie la memstaraj gejunuloj, ĝenerale dirite, ne volas sin kroĉi al la maljunaj generacioj, nek al siaj gepatroj. Ili estas ne obeemaj al sia sorto, sed penas teni sian sorton en la propraj manoj. Ili estas apatiaj al la antaŭa slogano "Amu vian laboron, kiu ajn ĝi estas", sed preferas la sloganon "Okupiĝu pri la ŝatata laboro". Nun en Kantono la senlaboraj gejunuloj fakte ne estas multaj,

sed plejparto el ili memvole forlasis sian laborpostenon por serĉi pli konvenan pro malŝato de la antaŭa okupo. Antaŭe mi informiĝis, ke la kantonaj gejunuloj estas profitemaj, tamen faktoj diris al mi, ke plejparto de la tieaj gejunuloj havas fortan devosenton pri la socio kaj zorgas pri reformado de la socio kaj sia laborejo. La reformado kaj pordmalfermo larĝigis ilian vidkampon, akrigis ilian pensadon kaj disting-povon. Per sia racio ili rememoras la historiajn okazojn, meditas pri la kompleksa realo kaj decidas sian okupon. Tie mi aŭdis jenan aferon: En la reformado la Kantona Fabriko de Horloĝo-ŝeloj ricevis proponan leteron skribitan de "iu junulo, kiu volas dividi ĝojon kaj malĝojon de la fabriko kaj vivas la saman vivon kun ĝi". En la letero la skribinto donis trafajn proponojn pri la produktado, administrado, personaĵa afero, distribuo kaj aliaj gravaj problemoj de la fabriko. Post enketado oni malkovris, ke la skribinto estas junulo fama tra la tuta fabriko pro malbonkonduto, kiu estis trifoje punita pro interbato, ŝteleto de publikaj objektoj kaj foresto de laboro. Kiam mi demandis lian motivon, li respondis, ke li estas membro de la fabriko, tial li deziras pliboniĝon de sia fabriko, pro kio li mem povas fari pli da kontribuoj. "Aktive sin miksi en la publikajn aferojn anstataŭ senfare stari apude" estas alia granda ŝanĝiĝo de la koncepto de la kantonaj gejunuloj. Multaj el ili donis al sia fabriko raciajn proponojn kaj aktive partoprenis en la aktivado "Se mi estus fabrikestro". "Pli da kontribuoj al la fabriko" kaj aliaj. La gejunuloj de pluraj fabrikoj kaj entreprenoj memvole organizis societojn pri moderna administrado, studentajn klubojn kaj aliajn por studi kaj analizi la produkton de sia entrepreno kaj merkatan staton kaj fari proponojn al la fabrikoj. Estas fortaj ankaŭ iliaj kreiveco kaj strebado. Sole en la unua duonjaro de 1985 ili plenumis 1 098 projektojn de la novaj produktaĵoj, el kiuj 110 plenigis la mankon de nia lando kaj 65 atingis la avangardan landan nivelon.

Ekde praktiko de la pordmalferma politiko torentis en Ĉinion ankaŭ putra kulturo de eksterlande, komencis denove malbonodori ankaŭ la kulturaj fecoj originaj de Ĉinio, kio malboninfluis parton de la kantonaj gejunuloj. Iuj el ili fariĝis mondadorantoj. Ili volontas fari ĉion, kio estas profitdona. Tie surstrate mi plurfoje renkontis modajn junulojn, kiuj kaŝkomercas per ŝanĝ-atestoj de fremdaj valutoj kaj hongkongaj valutoj kaj per brakhorloĝoj kaj kodakoj. Iuj eĉ glitis en kriman aktivadon: ŝtelon, rabadon kaj seksatencon. Estas bedaŭrinde, ke la krimuloj pli kaj pli juniĝas. Iuj dekkelkjaraj knaboj jam komencis krimi en bando. Tio vekis ĝeneralan atenton de la tuta socio. Por solvi tiujn problemojn la urba registaro, publik-sekureca buroo, lernejoj kaj aliaj koncernaj organizoj donis pli da atento al edukado de la gejunuloj. En la lernejoj aldoniĝis leciono pri juro. La loĝkvartaloj kaj lernejoj donas specialan helpon al iuj malbonkondutaj geknaboj, diskutante kun iliaj gepatroj pri iliaj psiko, konduto kaj psikologia ŝanĝiĝo kaj aktive helpas ilin en la reformado. Dank' al la penigaj laboroj en la lastaj du jaroj en Kantono la krimadoj jam multe malleviĝis kompare kun tiuj en 1982 kaj 1983.

Pro nesufiĉo de tempo mi ne povis penetriĝi en la tiea gejunula vivo, tamen en la flugrigardo mi ja vidis la buntan mozaikon, kvankam kelkloke nekonkorda, tamen la ĉefa trajto estas brila.



*Balo*

**HŬANG ĜIŬEN:**

# La vivo de maljunuloj en ĉinaj urboj



*La 102-jara Lu Afu de Ŝanhajo kaj ŝiaj bofilino, nepo kaj pranepino*

S-ro Roan Orloff Stone de Usono kaj aliaj samideanoj skribis al nia redakcio, ke ili volas scii pri la vivo de la ĉinaj maljunuloj. Jen ni prezentas la nunan staton kaj tendencon de la vivo de maljunuloj en ĉinaj urboj.

La enspezoj de la familianoj servas kiel vivrimedoj de tia familio, en kiu gefiloj jam elkreskis kaj havas okupon. Nun ekzistas kvin specoj de la ekonomia aranĝo en la urbaj familioj de Ĉinio: 1. mastrumado de gepatroj, t. e., gefiloj donas sian salajron tutan aŭ partan al siaj gepatroj kaj la lastaj respondecas pri diversaj elspezoj, kiaj domlupago, pago por akvo, elektro, vestoj, mebloj k.a. Tiu speco estas videbla ofte en la familioj, en kiuj la gefiloj ne geedziĝis; 2. duonmastrumado, t. e., geedziĝinte, gefiloj loĝas daŭre ĉe siaj gepatroj, al kiuj ili donas parton de sia enspezo por la ĝenerala elspezo, sed gazetojn, librojn, vestojn kaj tonikojn la familianoj mem aĉetas laŭ sia bezono. Okaze oni kune aĉetas televidilon, fridujon kaj aliajn altvalorajn objektojn. Tia aranĝo kontentigas kaj la komunan vivon kaj la malsamajn bezonojn de juna kaj maljuna generacioj. Tio estas volonte akceptita de la familioj, kies membroj vivas harmonie; 3. monopolo de gepatroj, t. e., maljunuloj vivas kune kun siaj gefiloj kaj pagas por ĉiuj bezonaĵoj de la familio. Tio okazas en la familioj, kies membroj ne estas multaj kaj la gepatroj havas bonan salajron. Ankaŭ troviĝas iuj personoj, kiuj ne volas pagi sian vivtenan koston, sed elspezigas siajn gepatrojn, kiuj havas nebonan salajron; 4. mastrumado de gefiloj, t. e., edz(in)iĝintaj fil(in)oj zorgas pri la familia vivo kaj iliaj gepatroj devas doni parton aŭ tuton de sia enspezo. Tion oni praktikas en tiaj familioj, en kiuj gepatroj jam maljuniĝis aŭ havas neniom aŭ malmulte da enspezo; 5. speco de ekonomia sendependeco. Edz(in)iĝintaj fil(in)oj vivas kune kun siaj gepatroj, sed ekonomie ili estas sendependaj unuj de la aliaj. Iuj donas al siaj gepatroj iom da mono ĉiumonate por ilin vivteni. Tia aranĝo estas en la familioj, en kiuj pluraj edz(in)iĝintaj fil(in)oj loĝas kune kun siaj gepatroj, aŭ en tiaj familioj, en kiuj estas malakordo inter la du generacioj.

Laŭ analizo pri la reala ĉiutaga vivo de urbaj loĝantoj, 60-74-jaraj maljunuloj prenas sur sin la hejman laboron pli multe ol siaj gefiloj, kiaj aĉeto de almanĝaĵoj kaj aliaj objektoj, lavo de vestoj, preparo de manĝo, purigo de ĉambroj kaj flego de infanoj, i. a. la trifoja manĝpreparo ĝenerale estas farata de maljunuloj, kiuj emeritiĝis, tamen estas energiaj kaj volontas servi kiel "ministro de provianto" por siaj gefiloj tre okupitaj de sia laboro. Ili estas ĉeflaboruloj en la hejmo. 75-84-jaraj maljunuloj plejparte febliĝis kaj suferas de pluraj malsanoj. Ilin ĝenerale flegas kaj akompanas al hospitalo iliaj gefiloj, kiuj loĝas ĉe ili. Ankaŭ bonkoraj najbaroj helpas subite malsaniĝintajn maljunulojn veturi al hospitalo. Emeritoj estas senpage kuracataj. La socio kaj iliaj gefiloj ilin prizorgas bone. Ĝenerale la familioj kun maljunuloj havas bonan mastrumadon kaj la infanoj ricevas bonan flegon. Inter la pli-ol-85-jaruloj plejparto estas virinoj, kiuj neniam profesiis kaj estas vivtenataj, respektataj kaj bone flegataj de siaj gefiloj. Enketo montras, ke troviĝas ankaŭ iuj, kiuj ne respektas nek komprenas siajn gepatrojn, sed ŝarĝas ilin per peza hejmlaboro.

Pro sia debileco kaj ŝanĝiĝo de la socia pozicio post la emeritiĝo la maljunuloj ne plu estas fortuloj en la socio kaj kreantoj de riĉaĵoj, sed subite fariĝis protektatoj de la socio kaj centpo-

centaj konsumantoj. Tiel ĉe ili facile naskiĝas pesimismaj sentoj de postiĝinteco, humiliĝo, negrupiĝemo k. s., sed ili mem ne volontas lasi sin en tia stato. Naskiĝas ĉe ili ankaŭ kontraŭdiraj sentoj kaj ŝanĝiĝas ankaŭ iliaj karakteroj kaj kondutoj. La maljunuloj sopiras des pli forte la kontenton en spirito, kiun ili ĝuis antaŭe en la kunvivado kun siaj posteuloj. La enketo montras ankaŭ, ke en la harmoniaj familioj gefiloj ĝenerale bone prizorgas kaj komprenas siajn gepatrojn. Ili babilas kun ili ofte en libertempo, kio tre helpas interŝanĝon de pensoj. Iuj kuraĝigas siajn maljunajn gepatrojn aŭ kreas kondiĉojn por ili, ke ili estu societemaj kaj faru ekskurson, korpajn ekzercojn kaj publikajn servojn, kun celo daŭre kontaktiĝi kun la socio. Maljunaj vidv(in)oj aŭ eksedz(in)oj post emeritiĝo suferas de soleco kaj deziras kontentigan edz(in)on. En la pasinteco pro tradiciaj feŭdaj moroj gefiloj kutime intervenis en la reedziĝon de sia patro aŭ patrino. Nun funkcias svatagentejo por gemaljunuloj en grandaj kaj mezgrandaj urboj. Kaj gejunuloj komencis kompreni kaj prizorgi maljunulojn, kaj nemalmultaj el ili registris sian patr(in)on en svatagentejo. Iu knabino fervore serĉis kontentigan amaton por sia vidvino-patrino. Respondante la demandon, kial ŝi volonte subtenas sian patrinon reedziniĝi, ŝi malkaŝe diris: "Mia patrino vivas solece, kaj ni ne povas plenigi ŝian spiritan vakecon. Mi kompatas ŝin kaj esperas, ke ŝi havos idealan edzon."

Nun en Ĉinio maljunuloj vivas ĉefe en sia hejmo. Prenas sur sin la devon vivteni maljunulojn ne nur iliaj propraj gefiloj, sed ankaŭ iliaj proksimaj kaj eĉ malproksimaj parencoj. Tio estas ĉina tradicia etiko kaj nova socialisma rilato inter la homoj. Lastatempe la problemo de maljunuloj vekis pli kaj pli grandan atenton de la socio. Diversaj publikaj servoj por maljunuloj aperis unuj post aliaj. Ekz. loĝkvartalaj organizoj havas siajn servajn grupojn por flegi malsanulojn kaj prepari manĝon por ili. Vendistoj volonte portas varojn al ilia hejmo. En iuj grandaj urboj oni konstruis aŭ konstruos maljunulejojn kaj apartamentajn domojn por maljunuloj, kio povas efike solvi iliajn malfacilojn. La disvolviĝo de tiaj publikaj servoj kaj sociaj bonstatigaj aferoj kreos bonajn kondiĉojn por maljunuloj pasigi tempon ne nur en la hejmo. Kun disvolviĝo de ekonomio, laŭebla havigo de profesio kaj perfektiĝo de la socia asekura sistemo de la kolektiva kaj individua ekonomioj, pli kaj pli multaj maljunuloj vivos memstare en ekonomio kaj pli kaj pli malmultiĝos tiuj, kiuj bezonas ekonomian helpon de siaj gefiloj. Pro plurflankaj familiaj enspezoj ŝanĝiĝos la rilatoj inter la familianoj.

Ĝenerale la maljunuloj en ĉinaj urboj vivas kulture pli riĉe ol tiuj en la kamparo. La soleco kaj malsekureco de maljunuloj, malfacile solveblaj problemoj eksterlande, ne estas seriozaj en Ĉinio, ĉar la maljunuloj en Ĉinio pli multe kontaktiĝas kun la socio. Ilia harmonia kaj trankvila



*Bofilino tajloras por sia bopatrino.*


*Familianoj de tri generacioj en ferio*



vivo, efektiviĝo de iliaj deziroj kaj esperoj kaj kontentiĝo de ilia ŝatokupo sentigas al ili feliĉon. Kaj ĉio ĉi tio postulas zorgon kaj subtenon de diversaj flankoj de la socio. Malsamaj maljunuloj havas malsamajn postulojn en spirito. Malalte klerigitaj maljunuloj volas, ke iliaj gefiloj kaj genepoj respektu ilin kaj ilian aranĝon en la hejmo kaj multe informu ilin pri novaĵoj, kaj ke ĉiuj familianoj kune pasigu la festajn tagojn. La fakaj emeritoj volas dediĉi sian lastan energion al sia afero. La maljunuloj fervoraj por la sociaj aferoj rigardas gloro la publikan servon. Sed estas tiaj junuloj, kiuj ne konas la psikon de la maljunuloj, ne zorgas pri ili, nek aprobas iliajn petojn, sed ofte subjektive kaj unuflankece riproĉas ilin, eĉ malvarme kaj malŝate traktas ilin. Iuj eĉ turmentas ilin, kio kaŭzas multajn kontraŭdirojn kaj konfliktojn en la problemoj de vivrimedoj, loĝo, posedaĵo kaj reedz(in)iĝo, kiuj jam vekis la atenton de la publiko.

# Sekreto de longviveco

de **LU ŜINGŬO**




*Viglaj maljunuloj de Gongŝjan-gubernio, Henan-provinco*

Ĉinaj sciencistoj malkovris iom post iom la sekreton de longviveco — bona korstato, konvena medio, racia nutrado, necesa korpoekzerco kaj preno de mikroelementoj.

La Tria Censo en 1982 de Ĉinio montris, ke maljunuloj super 65 jaroj nombras pli ol 77.83 milionojn, inter kiuj virinoj konsistigas 53.5 pocentojn. 3 765 maljunuloj atingis la aĝon de 100 jaroj. Plejparto de tiuj grandaĝaj maljunuloj loĝas en limaj regionoj, montaro kaj kamparo. 860 centjaruloj vivas en Ŝinĝjang, 441 en Gŭangdong kaj 405 en Gŭangŝji. Esplorante lokojn kie vivas multaj longvivuloj kaj tiujn maljunulojn, specialistoj trovis kelke da komunaj faktoroj.

**Rilate korstaton kaj karakteron:** Esplorado en Pekino, Ĉangŝa, Ĉangĉun k.a. montris, ke plejparto de la longvivuloj estas vastanimaj, modestaj, serenaj, optimismaj kaj fidoplenaj al la vivo. En Hubej, nur 4 el la 88 longvivuloj estas malsocietemaj.

*La 120-jara Hu Jŭanĉing de Hubej-provinco ricevis ateston "Sana Maljunulo" kaj donacon porcelana longvivulo.*




**Rilate nutradon:** La centjaruloj de la landinterno prenas por si manĝaĵojn malmultkaloriajn, malaltgrasajn, malaltproteinajn kaj ankaŭ grandkvantajn legomojn. La longvivuloj de Ŝinĝjang ofte prenas maldelikatajn grenojn kaj sin izolas de malbonaj ŝatoj, kvankam ili prenas ĉefe laktaĵojn, ŝaf- kaj bovviandojn.

**Rilate medion:** En Ŝinĝjang kaj Gŭangŝji estas multaj montaroj kun alteco de 500 — 1 500 metroj, kie abundas pluvo kaj konvena temperaturo. Tie la aero estas freŝa, akvo pura, kio tre favoras al longviveco.

**Rilate laboradon kaj korpoekzercon:** Naŭ dekonoj de la centjaruloj tutjare faras fizikan laboron, multaj estas laboremaj eĉ en la aĝo super cent jaroj.

Specialistoj rimarkis, ke mikroelementoj strikte rilatas longevivecon. Ĝenerala analizo montras, ke la haroj de la centjaruloj estas selenozaj, manganozaj kaj samtempe kadmio-mankaj. La ĉefa faktoro kuŝas en tio, ke la greno de ilia loko entenas riĉan kvanton da seleno, fero kaj aliaj mikroelementoj, kio helpas preventi koronarian kormalsanon kaj tumoron. Ankaŭ la tero kaj akvo de ilia loko entenas mikroelementojn, kiuj utilas al prevento de malsano kaj malfruigo de seniliĝo.

Antaŭ nelonge finiĝis la Sesa Simpozio de Suda Ĉinio kaj la Tria Simpozio de Gŭangŝji de Maljunula Medicino. Multaj specialistoj diris ĉe la simpozioj, ke estas necese krei long-vivigan medion por ke plejparto de la homoj povu vivi pli longe.



*En ĝardeno por maljunuloj en Ĉenghaj-gubernio de Gŭangdong-provinco*



*La 80-jara Sun Ŭejhe ĉe la fino de 3 000-metra kurado*



*Maljunula domo*

# Feliĉaj maljunuloj


Fotoj de **ŜEN ĈEN**

*Ĉe la Maljunula Festo de la korea nacieco*






*Korpa ekzercado en mateno*




*Soifo al scioj*




*Eminenta pedagogo Sun Ĝingŝiŭ kaj infanoj*

Foto de **CAJ HAJFENG**



"Mi volas tiun ĉi televidilon."



Maljunulo en sia hejmo

Piedpilko de maljunuloj






Foto de **JE ĜIŜJONG**

*En fabriko de elektraj aparatoj*

Foto de **JE ĜIŜJONG**




# Ĝuhaj, perlo ĉe la Suda Ĉina Maro

de **GE ŜI**

*La nova hotelo Gongbej karakterizita per nacia arkitekturo*

Foto de **LJANG GŬANGĜONG**



La urbo Ĝuhaj situas ĉe la okcidenta bordo de la Perla Rivero en Gŭangdong-provinco, fronte al la Suda Ĉina Maro kaj transmare rigardas al Ŝenĝen kaj Hongkong, kaj sude ĝi limtuŝas Aŭmen. Ĝi estas nova urbo, kiu prenas la prilaboron de eksportaj varoj kaj turismon kiel siajn ĉefajn taskojn, kaj estas ankaŭ unu el la gravaj havenurboj de Ĉinio malfermitaj al aliaj landoj.

Ĝuhaj estis malgranda gubernio kun tre postiĝintaj agrokulturo kaj fiŝkaptado. Tie la kulturo estis ankaŭ subevoluinta. De post praktikado de la pordomalferma politiko, en 1979 la ŝtato prenis ĝin kiel urbon rekte gvidatan de la provinca registaro por plene utiligi la tieajn favorajn kondiĉojn: proksime al Hongkong kaj Aŭmen kaj oportune por surmara navigacio. En 1980 la ŝtato fondis tie specialan ekonomian distrikton. Samkiel en aliaj specialaj ekonomiaj distriktoj Ŝenĝen, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen, oni praktikas tie la specialajn politikojn kaj akomodiĝemajn rimedojn. Ankaŭ ĝi estas unu el la ĉinaj havenurboj malfermitaj al aliaj landoj.


La urbo administras du distriktojn kaj unu gubernion, interalie la Ĝuhaj-a Speciala Ekonomia Distrikto situas ĉe la marbordo, en la urba sudoriento kaj staras tuj apud Aŭmen. Ĝi kun totala areo de 15.16 kvadrataj kilometroj estas la plej malgranda el la kvar ĉinaj specialaj ekonomiaj distriktoj. En 1984 la ŝtato sankciis, ke en la urbo Ĝuhaj oni praktiku la samajn politikojn en utiligo de eksteraj kapitaloj kaj enkonduko de la avangardaj teknikoj samkiel la 14 urboj malfermitaj al aliaj landoj, tial la ekonomio disvolviĝas en la tuta urbo Ĝuhaj, konforme al la konstruado de la speciala ekonomia distrikto. En la 5 jaroj post la fondiĝo de la speciala ekonomia distrikto ĝis nun, granda ŝanĝiĝo okazis en Ĝuhaj. La antaŭaj kabanoj sur la sovaĝejo, kontrastantaj draste kun la domegoj en najbara Aŭmen, estas jam anstataŭigitaj per la fabrikdomoj kaj vilaoj. Nun rudimenta ĝardena urbo kun modernaj ekipaĵoj kaj natura pejzaĝo perle brilas ĉe la bordo de la Suda Ĉina Maro.

La urbo Ĝuhaj, kun milda klimato kaj varia topografio, havas 112 insuletojn. Tie ĉarmas montetoj, kuriozas rokoj, multas riveroj kaj fontoj, ĉio ĉi kun la agrabla strando faris la urbon bele naturdotita turisma loko.

Ekde la fondiĝo de la speciala ekonomia distrikto, la tiea turisma afero ricevis grandan disvolviĝon pro la naturaj riĉoj. Utiliginte la specialajn ekonomiajn politikojn la distrikto grandkvante enkondukis eksterlandajn kapitalojn. Sole por la turisma afero, ĝis junio de 1985, Ĝuhaj jam enkondukis kapitalon de cent milionoj da usonaj dolaroj de la fremdlandaj komercistoj. Tie oni konstruis 10 pitoreskejojn, turismajn vidindejojn, du grandtipajn amuzejojn kaj unu golfludejon kun internacia normo. En 5 jaroj tie konstruiĝis pli ol 30 belaj kaj luksaj hoteloj kaj drinkejoj kun 4 600 litoj. La Ŝiĝingŝan-a Turisma Centro situas apud monto kaj rivero, kun konstruaĵoj hispanstilaj. Ĝiaj 22 pejzaĝoj estis konstruitaj inter alte leviĝantaj rokegoj kaj artefaritaj lagoj. Interalie, sur rokego ĉe la Homvivo-sopira Lago staras skulptitaj 7 feinoj de ĉina antikva mito, kio harmonias kun la apudaj vilaoj hispanstilaj. Vera majstraĵo! La Gongbej-a Hotelo, nur kelkcent metrojn for de la dogano de Aŭmen, estis konstruita laŭ la formo de Epang-a Palaco de Ĉin-dinastio (221 — 206 a.k.), kun kolore pentritaj traboj kaj kolonoj, ĝi montras la

*Profunda doko de Ĝiŭĝoŭ-haveno*

Foto de **HONG BO**



luksecon kaj grandiozecon de la ĉinaj antikvaj palacoj.

De la fondiĝo kaj malfermiĝo de tiuj pitoreskejoj kaj vidindejoj, en 5 jaroj oni sume akceptis 1 500 000 turistojn el pli ol 100 landoj kaj regionoj. Nun la enspezo de la turisma afero jam okupis la duan lokon en la financa kaj fremdvaluta enspezoj de la urbo Ĝuhaj.

La konstruado de la speciala ekonomia distrikto kaj disvolviĝo de la tiea turisma afero akcelis la prosperiĝon de la komerca kaj serva aferoj. Ĝis la jarfino de 1984, la totala nombro de la komercejoj kaj servejoj 5.6-obliĝis de tiu en 1980, interalie, la individuaj komercistoj pliiĝis 10.4-oble. En la urbaj kvartaloj aperis multaj grandaj komercejoj kaj servaj centroj. La 10-hektara Ĝuhaj-a Komerca Urbeto, kun konstrua areo de pli ol 250 000 kvadrataj metroj, komencis konstruiĝi en januaro, 1985 inter la Marborda Parko kaj la Ĝuhaj-a Hotelo kaj finkonstruiĝos laŭplane en 1987. Tiu ĉi komerca urbeto konsistas el kelkdek grandaj komercejoj, unu 30-etaĝa hotelo kaj unu 40-etaĝa oficdomego kun akcesoraj instalaĵoj, kie oni povos okazigi internaciajn aktivadojn, kiaj negoco, turismo, venda ekspono kaj kunvenoj.

En la lastaj jaroj, la Ĝuhaj-a Speciala Ekonomia Distrikto kvankam plenumis iujn fundamentajn konstruojn kaj fondis iujn fabrikojn kaj entreprenojn per teknikoj kaj kapitaloj eksterlandaj kaj kunlabore kun aliaj lokoj enlandaj, tamen, ĝia industrio disvolviĝis multe pli malrapide kompare kun tiu en Ŝenĝen, ĉar ĝiaj ĉefaj fortoj estis metitaj en turismo kaj komerco, kio malboninfluis la disvolviĝon de la tuta ekonomio de la urbo. En 1984 la magistrato de Ĝuhaj difinis la politikon preni la industrian konstruadon kiel sian ĉefan taskon kaj konstrui Ĝuhaj en sintezan specialan regionon kun industrio, komerco, agrokulturo, fiŝkaptado kaj turismo en plena disvolviĝo. Helpate de la koncernaj fremdaj kaj enlandaj fakuloj, Ĝuhaj ellaboris sian ĝeneralan konstruan planon — antaŭ ĉio fari ekspluatadon grandskalan, altnorman kaj ĉiuflankan. Sur la areo de 10 kvadrataj kilometroj pli ol 40 000 laborantoj el 160 prospektoraj, projektaj kaj konstruaj trupoj de diversaj lokoj partoprenis en la fundamenta konstruado por funkciigi aŭtojn, ŝipojn kaj poŝton, provizi elektron kaj kranakvon, plenumi konstruadon de kloakoj kaj akvodrenaj kanaletoj kaj ter-ebenigon. Sole en 1984 la speciala ekonomia distrikto jam plenumis la konstruan investon de 2.4 cent milionoj da ĉinaj juanoj, 2.7-oble de la totala investo en la antaŭaj 4 jaroj. Kaj la finkonstruitaj normaj fabrikdomoj kaj la totala plankareo de loĝdomoj atingis 380 000 kvadratajn metrojn, kio egalas al tiu en la pasintaj 4 jaroj.

Samtempe kun la grandskala fundamenta konstruado, Ĝuhaj faris sintezan ekspluaton. Oni planas konstrui la lokojn en sintezajn industriajn kvartalojn, kiuj havas loĝejojn, komercajn vendejojn, lernejojn, infanĝardenojn, amuzejojn ktp, kun industrio kiel la ĉefa parto. La Nanŝan-a Industria Kvartalo, meze de la speciala ekonomia distrikto, estas la unua fundamente finkonstruita sinteza industria kvartalo. En 1984, por ĝia konstruado oni faris preparadon en marto, rekviziciis teron en aprilo, faris projekton en majo, ebenigis la teron en junio, oficiale komencis la konstruadon en julio kaj februare de 1985, nur duonjaron oni jam finkonstruis plankareon de 140 000 kvadrataj metroj en la unua konstrua periodo, kio karakteriziĝis per altrapideco, altkvaliteco kaj altefikeco en ĉiuflanka laboro de la tiea konstruado. Sinsekve komenciĝis la konstruado ankaŭ en la sintezaj industriaj kvartaloj Ĝida, Bejling, Nanpu, Ŝjangĝoŭ ktp. En 1984, en 604 objektoj investitaj per fremdlandaj kapitaloj, industrio konsistigis 80.7%, el kiuj plejparto havas avangardan nivelon de la 80-aj jaroj kaj parto el la objektoj estis jam finkonstruita kaj komencis sian produktadon. Ili rapidigis la disvolviĝon de la industrio en Ĝuhaj, tiel ke la proporcio de industrio en la totala produktovaloro de industrio, agrokulturo kaj fiŝkaptado altiĝis de 39.3% en 1978 al 82% en 1984.

En la lastaj jaroj, en Ĝuhaj jam formiĝis la industria produkta sistemo ĉefe kun la industrioj elektronika, malpeza, tekstila, vestofara, konstru-materiala kaj manĝaĵo-prilabora. Interalie la elektronika kaj tekstila industrioj estas pli grandskalaj kaj posedas kompare avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn kaj altan produktan nivelon. Ekzemple, la Distrikta Elektronik-aparata Fabriko enkondukis avangardajn instalaĵojn el aliaj landoj, kaj per tiuj formis la produktajn liniojn de radiomagnetofonoj kaj koloraj televidiloj, kun relative alta aŭtomateco. La Hŭaŝeng-a Sonbenda Fabriko enkondukis de eksterlande kompleton da ekipaĵoj, per kio ĝi formis sian produktan linion, kiu ĉiujare povas produkti 21 milionojn da kasetaj sonbendoj. La HCD-seria enkaseta ekzamen-esplora bendo, per kiu oni ekzamenas kaj esploras la kapablon de magnetofonoj, atingis la

teknikan normon de la samspecaj produktaĵoj de fremdaj landoj, kio ŝtopis la breĉon de la enlandaj produktaĵoj. La Ŝjangĝoŭ-a Ŝpinteksejo kaj Nanĝoŭ-a Ŝpinteksejo kune entreprenataj kun fremdlandanoj ĝuas bonan prestiĝon inter la en- kaj eksterlandaj klientoj pro siaj bonkvalitaj produktoj.

La 5-jara konstruado grave bonstatigis la investan medion de Ĝuhaj kaj pliigis ĝian allogadon por fremdlandanoj. En la 5 jaroj, en la tuta urbo oni konstruis kaj larĝigis 24 vojojn kun totala longeco de 51 kilometroj, interalie la ŝoseoj en la speciala ekonomia distrikto longas 20 kilometrojn, kio fundamente formis la ŝosean reton. Jam komenciĝis la konstruado de la aŭtovojo de Hongkong tra Ŝenĝen kaj Kantono ĝis Ĝuhaj. En la speciala ekonomia distrikto, oni nove konstruis Ĝiŭĝoŭ-havenon kaj malfermis la trafikajn akvovojojn de tie al Ŝenĝen kaj Hongkong, kaj ekspresa hidrofolia ŝipo povas atingi la lokojn en nur 60 aŭ 70 minutoj. Nun, tie estas konstruata profundakva doko kie povas ankriĝi 10 000-tonelaj ŝipoj, flughaveno kun haltejoj de 30 helikopteroj estis jam finkonstruita, oni povas flugi de tie al Kantono nur post 40 minutoj, kaj la granda internacia flughaveno ankaŭ estas aktive preparata por konstruado. La rektaj butonpremaj telefonoj inter Ĝuhaj kaj Kantono, Hongkong kaj Aŭmen estis jam funkciigataj. La sistemo kun 2 000 programregaj aŭtomataj telefonoj en la speciala ekonomia distrikto estis jam transdonita al uzado aprile de 1985 kaj komencis labori por la internacia telekso.

Dank' al la konstrua disvolviĝo de la distrikto, Ĝuhaj paŝon post paŝo fariĝis eksporta bazo de agrokulturaj produktoj kaj fiŝoj. Ĉiujare Ĝuhaj eksportas pli ol 12 000 tunojn da legomoj, kaj granda kvanto da freŝaj floroj estas eksportata al Aŭmen. Rapide disvolviĝis ankaŭ la dolĉakva kaj marakva bredado. Nun en la tuta urbo troviĝas pli ol 1 100 hektaroj da ostrokulturaj kampoj, de kie oni povas rikolti ĉiujare pli ol 800 tunojn da ostroj, kies plejparto estas eksportata. Nun estas ankaŭ la marakva fiŝbredado en retoj. Pro la grandskala pliiĝo de la eksportataj agrokulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kreskas jaron post jaro ankaŭ la enspezo de fremdaj valutoj.

En la lastaj 5 jaroj la tiea totala industri-agrikultura produktovaloro kvarobliĝis, dum tiu de industrio kreskis 7-oble, la financa enspezo kreskis 10-oble, enkondukiĝis 1 249 objektoj de fremdaj landoj kun investo de 1.5 miliardoj da usonaj dolaroj, el kiuj pli ol 40 milionoj estas jam utiligitaj en ekonomia disvolviĝo. Ĝuhaj rapidigas siajn paŝojn en la konstruado kaj nova konstrua tajdo vidiĝos poste.



*La internacia konferenca centro en la hotelo Ĝuhaj*

Foto de **LJANG GŬANGĜONG**



*La ĝarden-stila hotelo Ĝuhaj*

Foto de **LJANG GŬANGĜONG**

**LI SHIJUN:**

# En kaj ekster la Internacia Seminario de Bad Saarow

De la 9-a ĝis la 14-a de dec. 1985, okazis la Internacia Seminario pri Instruado de Esperanto al Plenkreskuloj en Bad Saarow, proksime de Berlino. Mi partoprenis ĝin. Mi ĝuis agrablan kaj plezurplenan vivon inter Esperantaj geamikoj novaj kaj malnovaj.

## EN LA SINO DE BEROLINA

Eble ankaŭ vi scias, ke la vorto Berlino devenis de la nomo de belulino nomata Berolina? Berlino ja estis centro de la laborista Esperanto-movado internacia antaŭ la enpotenciĝo de Hitler. Tagmeze de la 6-a de dec. 1985, kiam nia birdego alflugis super la urbon Berolinan, mi vidis neĝon postrestantan sur verdaj herbejoj kaj abiojn kaj pinojn svingiĝantajn en frosta vento.

Apenaŭ mi elpaŝis el la moderna domo de la Berlina flughaveno, renkonte rapidis al mi samideano R. Hahlbohm, vicprezidanto de la Esperanto-Asocio de GDR kaj d-ro Detlev Blanke, ĝia sekretario, kun rideto en la rigardoj, varme manpremis kun mi kaj enmanigis al mi bukedon de freŝaj floroj volvitaj en plasta papero. Frosta blovo atakis nin kaj ŝiris la plastan paperon, tamen la floroj disradiis al mi varmon el la amikaj koroj.

Ĉar mi alvenis Berlinon du tagojn antaŭ la komenco de la Seminario, mi povis ĉirkaŭrigardi la urbon, viziti magazenojn, muzeojn, eĉ trinki kafon en la salono kun turniĝanta planko ĉe la talio de la televida turo alta je pli ol 300 metroj kaj pririgardi la Kristnaskan Foiron ĉe la Aleksandra Placo.

Ĉe la Kristnaska Foiro iluminata de diverskoloraj lampoj brilantaj ankaŭ tage, torentis homamasoj brue gajaj: gepatroj kaj infanoj en peltaj aŭ lanaj pezaj vestoj, lernejaj geknaboj tri- aŭ kvarope trapuŝiĝantaj. . . kaj sur kaj super tiu gaja oceano de homoj turniĝis diversaj karuseloj kun alterne palpebrumantaj koloraj lumoj. Jen aŭdiĝis vigla melodio de dancmuziko, jen aŭdiĝis infanĥora popolkanto "La Abio", kies melodio kaj Esperanta teksto tiel familiaras al mi, ke ankaŭ mi pretervole ekzumis: "Abio, vi! Abio, vi, kun foliar' fidela! vi verdas ne nur en somer' sed eĉ dum vintra neĝveter'! . . ."

En la Kristnaska Foiro min plej profunde impresis la Junpionira Centro en provizora "palaco" bunte iluminata. Ĝi konsistas el dekkelkaj fabriketoj, en ĉiu el kiuj laboris ĉirkaŭdekjaraj metiistetoj, per segiloj, boriloj, marteloj, tondiloj, tranĉiloj, lutiloj k. a. simplaj instrumentoj, sub la gvido de siaj junaj majstroj. Tin-tin-tin! Pum-pum-pum! El nuksoj, faboj, lignaj disketoj kaj bloketoj, folioj kaj branĉetoj, papero kaj kartono, farboj kaj gluoj, koloraj ŝtofrestaĵoj el tajlorejoj kaj konfekciaj fabrikoj, ili kreis pupojn, ĉaretojn, kandelingojn, botanikajn specimenojn, fantaziajn bestojn kaj plantojn kaj multajn multajn aliajn interesajn kaj utilajn metiartaĵojn. Mi donacis mian verdstelan insignon al knabineto, kiu tuj donacis al mi reciproke bravan kokon el nukso kun algluitaj flanelaj flugiloj.


## EN BAD SAAROW

La 9-an de dec. la Seminario komenciĝis en Bad Saarow, laŭ la difinita dato. El la 45 aliĝintoj el 12 landoj, bedaŭrinde povis alveni nur 37 el 11 landoj orientaj kaj okcidentaj, nome Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, FR Germanio, GDR, Hindio, Hungario, Italio, Nederlando kaj Pollando. Kvankam ne ĉiuj 37 estas pedagogoj, tamen ĉiuj havas entuziasmon en serĉado de plej taŭgaj vojoj por rapide kaj efike disvastigi Esperanton. Ĉiuj partoprenantoj de la Seminario estis kaj instruantoj kaj lernantoj. La ĉ. dudek prelegojn sekvis diskutoj, foje tiel viglaj, ke la prezidanto devis uzi sian rajton por meti finon al laŭta parolo, ke la tagordo plenumiĝu laŭ la fiksita plano.

Ankaŭ la vesperoj estis plene utiligitaj por projekcii lumbildojn, demonstri perkomputilan instruadon de Esperanto, aŭskul-



*Parto de la partoprenantoj de la Seminario en Bad Saarow*



*La aŭtoro en prelegado*

ti surbendigitajn parolojn de Zamenhof, Kalocsay, Julio Baghy k.a. eminentaj esperantistoj, k.s. Okazis ankaŭ speciala vesperkunsido pri la ĉina Esperanto-movado kaj precipe pri la eldonado de Esperantaj libroj kaj gazetoj en nia lando. En tiu kunsido montriĝis pli ol tridek novaj Esperantaj libroj kaj gazetoj el Ĉinio, kiuj vekis rimarkindan intereson ĉe la ĉeestantoj, el kiuj multaj ne vidis la literaturajn verkojn, bildrakontojn, turismajn verkojn, gvidlibrojn, ĉinajn albumon kaj mapon, eldonitajn en la lastaj jaroj. Bedaŭrinde, mi ne povis kunporti al Bad Saarow tiel multe da ekzempleroj da ili por kontentigi la bezonojn de la ĉeestantoj; mi devas peti helpon de niaj diverslandaj perantoj, ke ili helpu al niaj geamikoj en mendo de la ĉinaj esperantaĵoj. En la kunsido, oni ankaŭ demandis pri la preparado de la 71-a UK en Pekino kaj faris konsilojn pri pretigo de malmultekostaj loĝejoj; oni ankaŭ faris proponojn por pliinteresigi nian gazeton EPĈ kaj la ĉinajn Esperantajn librojn. Kompreneble, ni serioze konsideros la vortojn de la geamikoj kaj klopodos por ilin kontentigi por tiel danki la geamikojn.

La Seminario finiĝis en la 14-a de dec. laŭ la tagordo. Kiam mi manpremis kun gekolegoj je la disiĝo, mi sciis, ke iuj el ili forveturos centojn aŭ milojn da kilometroj kaj eble neniam ni revidos nin; tamen mi sentis, kvazaŭ ni estus loĝantoj de sama lando, sama urbo, kaj disiĝus nur por momento.

## LA LASTAJ TAGOJ EN GDR

Post la seminario mi vizitis metiartan muzeon en kastelo de Kopenick, kie mi vidis porcelanaĵojn en la dekoka jarcento, la mondfaman kunvenejon de Potsdam, kie J. Stalin, F. Roosevelt kaj W. Churchill interŝanĝis opiniojn pri kreo de nova mapo de Germanio post la milito, kaj la belegan palacon de la Prusa reĝo Frederiko la Granda, kun vasta parko kaj diversstilaj konstruaĵoj inkluzive de Romia ruino. Kvankam senĉese oni faradis riparadon, tamen ĝis hodiaŭ oni ankoraŭ ne povis plene forviŝi la signojn postlasitajn de la detruado de la Dua Mondmilito. R. Hahlbohm diris al mi, ke baldaŭ Berlino festos sian 700-jaran jubileon, tial streĉa konstruado kaj rekonstruado nun iras tie.

Mi ankaŭ gastis en la hejmo de samideanoj R. Hahlbohm, D. Blanke kaj K. Maier kaj ĝuis ĉe ili neforgeseblajn varmajn vesperojn. El la riĉaj bibliotekoj de la tri amikoj aparte min interesis tiu de K. Maier pro la zorga kolekto de centoj da libroj pri Ĉinio. Tio konkrete pruvis al mi la profun-



*Ankaŭ ges-roj Maier (dekstre), malnovaj amikoj de EPĈ, ĉeestis la kunvenon de la Berlina E-klubo.*

*La aŭtoro inter moskvaj geesperantistoj S. Valentin, L. Ŝanina kaj V. Verigin (dekstre)*



dan amon de la posedanto al Ĉinio, kie li pasigis pli ol 20 jarojn; li ja estas unu el la plej malnovaj amikoj de la redakcio de EPĈ.


Vespere de la 17-a, mi ĉeestis regulan kunvenon de unu el la kvar Berlinaj Esperanto-grupoj. Tie mi vidis apud la gejunuloj ankaŭ veteranon kun aĝo de pli ol 80 jaroj, kiu en sia juneco aktivis por IPE. Ŝajne li ankoraŭ ne volas jam nun ekripozi trankvile, kvankam jam elkreskis junaj daŭrigantoj de la afero. Mi aldonu, ke la 75-jara L. Schödl eĉ montris al mi, antaŭ la Seminario, la lokon, kie staris de la milito detruita etaĝdomo, proksime de la Aleksandra Placo, en kiu laboris la aktivuloj de IPE Kaj ĉiujare ĉ. 40 veteranaj esperantistoj en GDR kunvenas por interparoli pri la movado. D-ro D. Blanke sciigis al mi, ke li estas kolektanta materialon pri la historio de IPE por sia verko, kiu ebligos al venontaj generacioj scii la gloran pasintecon de la pioniroj.

## EN MOSKVO

La 18-an de dec. mi adiaŭis R. Hahlbohm kaj D. Blanke, mi adiaŭis la Berolinan Urbon. Post aŭskultado de la muziko de radoj kaj reloj dum du tagoj, mi alvenis al Moskvo. Laŭ peto de D. Blanke, prof. M.I. Isajev kaj s-anino L. E. Ŝanina, prezidanto kaj sekretariino de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj min atendis ĉe la stacio. Ĉar mia trajno ekveturos nur post pli ol dudek horoj, la sovetiaj gesamideanoj havigis al mi la eblecon ĉirkaŭrigardi la urbon, uzi du el la subteraj fervojoj kaj viziti la Muzeon pri Lenin, sub la gvidado de la Moskvaj samideanoj Dmitrij Perevalov kaj Vitalj Verigin kaj samideanino Ĵ. Margarita el la Latvia ĉefurbo Riga. Haste ni renkontiĝis kaj interkonatiĝis kun ĝojo, haste ni disiĝis kun bedaŭrego kiel malnovaj amikoj.

Finante mian raporton mi aldonu, ke en Berlino kaj Moskvo mi havis okazon intervidiĝi ankaŭ kun respondeculoj de la Kulturligo de GDR kaj la Sovetia-Ĉinia Amikeca Asocio. Mi pensas, ke mi ne miskomprenis iliajn vortojn dum la mallongaj kunsidoj kaj esperas, ke la rilatoj inter la esperantistoj kaj popoloj de niaj landoj pli kaj pli boniĝos kaj en la estonto la redakcio de EPĈ povos pli bone servi al la esperantistoj en GDR kaj Sovetunio per niaj eldonaĵoj. Kompreneble, ĉiam serĉataj estas la amikaj helpoj de niaj novaj kaj malnovaj amikoj tie loĝantaj.

# Rivereto



Rivereto fluas de sur alta krutaĵo. Ĉiaj akveroj brue disputadas kaj ne volas flui kune.

Aŭdinte tion, maljuna pino admonis: "Sinjoroj, ne disiĝu! Unuiĝinte, vi havos sufiĉan forton por flui antaŭen al riverego, al maro. Se vi disiĝos, vi sukcesos en nenio!"

La akveroj ne aŭskultis la admonon kaj daŭre disputadas: "Ni ne atentu lian sensencaĵon. Li ĉiam staras tie, ne povante fari eĉ unu paŝon antaŭen. Certe li envias al ni viglan kaj rapidan kuradon!"

Ili bruas kaj bruas. Kaj fine ili kunfrapiĝis kun rokego kaj dividiĝis en kelke da malgrandaj fluetoj. Ili ĝoje kriis: "Bone, bonege! Nur disiĝinte, ni povos libere agi kaj montri nian propran kapablon!" Iuj eĉ opiniis, ke fluetoj ankoraŭ estas tro grandaj kaj ke pli bone estas vivi en akvoguto.

Post nelonge iuj estis sekigitaj de la suno, aliaj sorbitaj de tero kaj la triaj...

Unuvorte, ili tute malaperis.


# Herbeto

Roko fendiĝis pro longtempa korodado de vento kaj pluvo.

Herbosemo falis en la fendon.

"Kial vi venas al mi, kara infano? Mi estas tro mizera kaj ne povas vin vivteni," diris la roko.

"Panjo, ne maltrankviliĝu! Mi povos bone kreski," diris la semo.



Dank' al nutrado de printempaj pluvetoj elkreskis el la fendo burĝono.

La sunbriloj kaj printempa vento milde karesis la junan herbeton. Pluvo kaj roso ame ĝin nutris kaj flegis. Ĝi kreskis sane kaj fortike.

La roko ĝoje diris: "Obstina infano, vi estas mia fiero!" Ŝi firme ĉirkaŭprenis la radikojn de la herbeto.

Poeto preteriris kaj vidis ĝin. Li ne povis sin deteni de laŭdado:

"Ho, vivas herbeto kun forta obstino,

"Mi volas vin kanti senfine!"

La herbeto modeste diris: "Laŭdinda estas ne mi, sed la suno, la pluvo kaj la tero, kiu firme ĉirkaŭprenas miajn radikojn."

## ĈINIO PRODUKTIS LA UNUAN SCIENCAN DOKUMENTAN FILMON EN ESPERANTO

En la fino de 1985 rilata ĉina departemento, komisiite de la Internacia Akademio de Sciencoj, sukcese elfaris dokumentan filmon en Esperanto kaj en la germana kaj angla lingvoj pri la komputila sistemo. La scienca dokumenta filmo dublita unuafoje de Ĉinio en Esperanto estis projekciita en kunveno okazigita de la Internacia Akademio de Sciencoj en San-Marino.

La plurlingva komputila sistemo estas nova frukto de esplorado de "kodo de skribomaniero" de Li Ĝinkaj de la Pekina Instruista Universitato. Fakuloj ekspertizis ĝin kaj opiniis, ke ĝi kun granda rapideco, simpleco, precizeco kaj taŭgeco por diversaj lingvoj atingis la internacian avangardan nivelon.

Tiu komputila sistemo pere de komputila ekrano montras kodon de lingvo sur montroekrano. Ĝi konservas grandan kvanton da homaj memoroj en la komputilo. Ĝi bone servas al komputilistoj kaj aliaj sciencistoj kaj teknikistoj.

## ZAMENHOFA FESTO EN PEKINO

La 15-an de decembro 1985 la Pekina Esperanto-Asocio kaj la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto kune okazigis kunvenon por festi la 126-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, kiun ĉeestis respondeculoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio Ĝang Ĉjiĉeng, Ge Baŭĉjŭan, Ĝin Ziguang, Ĝang Hongfan, Zen Hojaŭ kaj matematikisto Sun Keding kaj aliaj pli ol 400 esperantistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Unue Ge Baŭĉjŭan faris raporton kaj prezentis la Esperantan literaturon, precipe ĝian influon al la ĉina literaturo, kio vekis grandan intereson ĉe la ĉeestantoj.

Poste Zen Hojaŭ pritraktis la progreson de la ĉina Esp-movado en la lastaj jaroj kaj la preparan laboron por la 71-a UK. Li emfazis, ke la 71-a UK en Pekino estas ne nur manifestiĝo de la disvolviĝo de Esperanto en la Oriento, sed ankaŭ arda deziro de pluraj generacioj de la ĉinaj esperantistoj; ĝi estas honoro kaj peza tasko de la ĉinaj esperantistoj. Li esperis, ke oni bone lernos Esperanton kaj energie laboros por sukcesigi la kongreson.

Parolis ankaŭ Ĝang Ĉjiĉeng, kiu opiniis signifoplena 71-an UK en Ĉinio.

En la kunveno prezentis Esperantajn programerojn membroj de la Pekina Esperanto-Asocio kaj lernantoj de la Esp-kurso de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto, la parola kurso de la Pekina Esp-Asocio kaj la Esperanta grupo de la Elementa Lernejo sub Ĉinghŭa-universitato.

## KUNVENO PRI KOMPILO KAJ KONTROLO DE ESPERANTAJ INSTRUAJ MATERIALOJ OKAZINTA EN ĈJŬANĜOŬ

Por unuecigi la kriteriojn de instruado kaj ekzameno de fakultativa Esperanto-kurso en ĉinaj altlernejoj, la Ĉina Esperanto-Ligo petis, vintre de 1983, la Ŝanhajan Fremdlingvan Instituton ellabori laŭ sia sperto instruan programon kaj kompili lernolibron, kiun la ligo jam transdonis al la Eduka Ministrejo (nun la Eduka Komisiono) de Ĉinio por peti ties aprobon, ke ĝi estu unueca instrua materialo en la lando. De la 24-a ĝis la 30-a de novembro 1985 la komisiono por kompilo kaj kontrolo de la libro "Esperanta Kurso" okazigis en Ĉjŭanĝoŭ en Fuĝjan-provinco kunvenon, kiun ĉeestis respondeculoj de la oficejo de la komisiono por altlernejaj fremdlingvaj instru-materialoj sub la Eduka Komisiono en suda Ĉinio, la oficejo por instruaj materialoj sub la Eduka Komisiono kaj la Ĉina Esperanto-Ligo kaj dekkelkaj spertaj Esperantaj instruistoj el la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Liming-universitato, la Siĉŭan-a

*Partoprenantoj de la kunveno pri kompilo kaj kontrolo de Esperantaj instruaj materialoj*



Universitato en Ĉengdu, la Instruista Instituto de Ĉinghaj, la Anhuj-a Universitato, la Anhuj-a Esperanto-kolegio, Ĝjinan-universitato, la Nankina Universitato, la Ĝjangŝji-a Ĉinmedicina Instituto, la Ŝjamen-a Universitato, la Pekina Lingva Instituto kaj la Centra-Ĉinia Instruista Universitato.

La kunveno opiniis, ke la lernolibro estas logike kompilita, laŭŝtupa, natura de la komenco ĝis la fino kaj taŭga pli ol la aliaj libroj por instruado de nedeviga kurso.

Post perfektiĝo "Esperanta Kurso" atendas la aprobon de la komisiono por kompilo kaj kontrolo de altlernejaj fremdlingvaj instrumaterialoj. La kunveno petis la Edukan Komisionon en la situacio, ke ne ekzistas unueca kriterio en la lando, taski al iu institucio uzi Esperanton por ekzamena temo, juĝo de ekzamena papero, difino de teknikaj aŭ profesiaj titoloj kaj akcepto de esploraj studentoj, ke tio ludu rolon de transiro al unueca kriterio por ekzameno kaj juĝo de ekzamena papero.

La kunveno okazinta sub la aŭspicioj de la Eduka Komisiono estis la unua en Ĉinio kaj faris solidan bazon por enkonduki Esperanton en la regulan instruan programon de Ĉinio.

## POR E-EKSPOZICIO DE LA LÓDZA FILIO DE PEA

Okaze de la jubilea jaro de Esperanto la Lódźa Filio de la Pola Esperanto-Asocio planas aranĝi grandan ekspozicion de Esperanto-movado en la mondo. Ili petas ĉiujn Esperanto-klubojn kaj privatajn esperantistojn en la mondo sendi diversajn materialojn, montrantajn la evoluon de Esperanto en diversaj medioj (ekzemple: fervojista, ĵurnalista, medicinista, scienca, turista, blindula ktp). Ankaŭ dokumentoj pri la instruado de la lingvo kaj la vaste komprenata kultura agado estas bezonataj. Ĉiujn materialojn bonvolu sendi al la adreso: "Galerio'87" Wschodnia-str. 29, 90-272 Lódź, Pollando.

La organizanto de la ekspozicio estas la grupo de profesiaj artistoj, alprenintaj la nomon "Galerio '87" aganta ĉe la Filio kaj organizita de la pentristino Tamara Roszak antaŭ unu jaro. La grupo estas malfermita por kontaktoj kun ĉiu, kiu interesiĝas pri la arto.

## AL LA 73-A KONGRESO DE JAPANAJ E-ISTOJ

La organiza komitato de la kongreso informas, ke en la 9-a kaj la 10-a de aŭgusto 1986 okazos la nomita kongreso en Oosaka, kaj atendas multajn partoprenantojn el multaj landoj. La kongreso havos variajn kaj interesajn programojn.

## KONTAKTOPETO DE RADIO CELJE

Radio Celje Jugoslavio elsendas ĉiujaŭde 15 minutajn programojn sub la devizo "Ni parolas pri Esperanto, por Esperanto kaj per Esperanto". La redakcio deziras ĉiuspecajn kontaktojn kun geesperantistoj el ĉiuj slovenaj regionoj. Skribu al Radio Celje por Esperanto, 63000 Celje, Jugoslavio.

## ESPERANTO-EKSPOZICIOJ EN VENEZUELO KAJ JAPANIO


En oktobro kaj novembro 1985, okazis en la Venezuela urbo Maracaibo kaj la japana urbo Takatuki du Esperanto-ekspozicioj. Tiu en Japanio, nome la 20-a Esperanto-Ekspozicio en Takatuki okazis kiel aranĝo de Kultura Festivalo de la urbo kaj ricevis oficialan aŭspicion. En ambaŭ ekspozicioj montriĝis "El Popola Ĉinio" kaj aliaj ĉinaj esperantaĵoj.

*"El Popola Ĉinio" en la ekspozicio de Esperantaj libroj kaj revuoj en la biblioteko de Maracaibo, Venezuelo*




*S-ro Takeuti Yosikazu, vicprezidanto de Takatuki-Esperanto-Societo, kaj s-ro E. Lindberg (la 1-a kaj la 2-a de dekstre) en la ekspozicio*






*Konkurso en la Ĉefurba Sporthalo de Pekino*

*La ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang (la meza en la dua vico) inter trejnistoj kaj sportistinoj*


# La Monda Virina Flugpilka Konkurso por Hitaĉi–pokalo



Teksto de **BAŬ HE**

Fotoj de **LAŬ BAJ**


*Inaŭguro*




De la 27-a de decembro 1985 ĝis la l-a de januaro 1986 la Flugpilka Teamo el Mondaj Stelulinoj vizitis Ĉinion, ludis en Pekino kaj Ŝanhajo kun la Ĉina Virina Flugpilka Teamo kaj estis venkita de ĝi je 1:3 kaj 2:3.


La 12 eminentaj stelulinoj venis el Kubo, Japanio, Usono, Sovetio, kaj aliaj kvin landoj.

La konkurso estis aranĝita de la Internacia Flugpilka Federacio, kaj la celo estas akceli la disvolviĝon de la monda flugpilka sporto.




*Intensa ludo*

*Facila rebato*



*Skribo de nomo por memoro*





*Strato de Ĉengdu*

VOJAĜO TRA ĈINIO

# Nova turisma urbo Ĉengdu

de **LI ĜJANG** Fotoj de **JAN ĜIN**

La provinco Siĉŭan, kies sudan parton trafluas Jangzi-rivero en sudokcidenta Ĉinio, havas areon de 567 000 kvadrataj kilometroj. Tie belas montoj kaj riveroj, abundas produktaĵoj, tial ĝi ricevis la nomon Ĉiela Lando. Ĉengdu, la ĉefurbo de la provinco kaj unu el la 24 famaj historiaj kulturaj urboj de Ĉinio, situas sur la fekunda Ĉŭanŝji-ebenaĵo. Frue en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) oni tie starigis ŝtatan administracion por brokado, tial oni nomis ĝin ankaŭ Brokoficista Urbo aŭ Broka Urbo. Oni iam plantis ĉirkaŭ la urbo hibiskojn, tial ĝi ricevis alian nomon Hibiska Urbo. Hodiaŭ, kiam turistoj promenas en la urbo, ili povas vidi la florojn ambaŭflanke de stratoj, en parkoj kaj kortoj. Tiu bela floro jam estis elektita de la urbanoj kiel la urba floro.

La plej famaj el la multaj antikvaj vidindejoj de Ĉengdu estas la pajla kabano de Du Fu kaj la templo Uhoŭ.

Du Fu estis granda realisma poeto de Ĉinio kaj vivis en la periodo de prospero al kadukiĝo de Tang-dinastio (618-907 p.K.). Milito envolvis lin en fuĝantan popolamason. En 759 li fuĝis al Ĉengdu, starigis kabanon ĉe la rivero Hŭanhŭaŝji en la okcidenta ĉirkaŭurbo de Ĉengdu kaj tie vivis kvar jarojn. Tie li verkis pli ol 200 poemojn por esprimi la zorgon pri la patrolando kaj la popolo. Li verkis pli ol 1 400 poemojn dum sia vivo kiuj ĝis nun ankoraŭ cirkulas inter la popolo. Liaj poemoj havis noblan penson, altan arton kaj profundan influon sur la ĉina literaturo, tial la posteuloj respektis lin kiel poezian sanktulon. La kabano loĝita de li estis protektata de diverstempaj popoloj. Post sia fondiĝo la nova Ĉinio faris al ĝi kompletan riparon kaj tie fondis Memorhalon de Du

Fu. La loko nun jam fariĝis parko kun nacistilaj antikvaj konstruaĵoj kaj ĝardenistiko en kombino kaj ĉiam tiras al si ĉinajn kaj alilandajn turistojn.

La templo Uhoŭ situas en la suda antaŭurbo de Ĉengdu, ĝi estis konstruita en la 6-a jc., por memorigi pri Ĝuge Ljang, la ĉefkortegano de Ŝu-regno en la Triregna Periodo (220-265 p. K.), kaj kunigita en Ming-dinastio (1368-1644) kun la templo de la unua imperiestro Liŭ Bej (161-223 p. K.) de Ŝu-regno kaj lia tombejo. La nunaj konstruaĵoj estis rekonstruitaj en 1672 p. K. Trapaŝinte ĝian pordon, oni povas vidi ses antikvajn steleojn ombratajn de antikvaj cipresoj. Inter ili la plej granda estis starigita en Tang-dinastio, ĝi ricevis la nomon "Steleo de Tri Plej-oj" pro ĝiaj epigrafo, kaligrafio kaj gravurado faritaj de famuloj. Enirinte la duan korton, vidiĝas la majesta centra halo de Liŭ Bej (la unua imperiestro de Ŝu-regno) kun lia statuo orita kaj la statuoj de liaj kamaradoj Gŭan Ju kaj Ĝang Fej en du apudaj haloj. En la orienta kaj okcidenta flankaj ĉambroj de la korto troviĝas statuoj de 28 civilaj korteganoj kaj generaloj de Ŝu-regno. Post la halo de Liŭ Bej estas la vasta halo de Ĝuge Ljang. Li estis tre saĝa ĉefkortegano de Liŭ Bej kaj rigardata de la ĉina popolo kiel simbolo de saĝo. Lia orita statuo staras meze en la halo, portante kaptukon kun nigraj rubandoj kaj tenante pluman ventumilon enmane. Sur la muroj kaj kolonoj pendas tabuloj kun vortoj aŭ versparoj laŭdantaj la talenton kaj meritojn de Ĝuge Ljang.


Krome, troviĝas ankaŭ aliaj historiaj vidindejoj en Ĉengdu. Ekz., la budhisma templo Ŭenŝujŭan estas fama en Ĉengdu kaj havas kvin halojn unu post alia kun pli ol 400 budhoj feraj, ŝtonaj, lignaj kaj kolore pentritaj. Nun la templo estas la sidloko de la budhismaj asocioj de Siĉŭan-provinco kaj Ĉengdu kaj ĉiutage akceptas grandan nombron da budhanoj en- kaj eksterlandaj. Ne malproksime de la kabano de Du Fu troviĝas taoisma templo Ĉingjanggong, kies du bronzaj kaproj antaŭ la pordo tre interesas la vizitantojn. Unu el ili havas solan kornon kaj groteskan formon, ĝi havas ratajn orelojn, bovan nazon, tigrajn piedojn, kuniklan dorson, drakan kornon, serpentan voston, ĉevalan buŝon, kapran barbon, simian kolon, kokajn okulojn, hundan ventron kaj porkajn gluteojn. Laŭdire, palpi ĝin povas forigi al la palpanto malsanon kaj malfeliĉon, tial ĝi vekas grandan intereson ĉe la pilgrimantoj.

Turistoj povas viziti ankaŭ ĉarmajn parkojn de la urbo. En la parko Ŭangĝjangloŭ ĉe la orienta antaŭurbo kreskas pli ol cent specioj de bambuoj, tial ĝi ricevis alian nomon "Bambua Muzeo". La Ĉengdu-a Zoo en la norda antaŭurbo montras sovaĝajn bestojn ĉefe de la sudokcidenta Ĉinio. Siĉŭan-provinco estas la hejmloko de pandoj, tial la parko havas plej multajn pandojn en la mondo. La ŝancelpaŝoj kaj komika sinteno de pandoj tre plaĉas al rigardantoj.

Turistoj povas rigardi ankaŭ la digon Duĝjangjan, la monton Ĉingĉeng kaj la urbon Leŝan.

La digo estis akvoadministra konstruaĵo plenumita de ĉinaj


*Sarira pagodo en la templo Baŭgŭang*





*Turistoj en la vidindejo Ĉingĉeng-monto*

*Metiartaĵoj el arĝentaj dratoj*



antikvaj laborantaj popolanoj sub la gvido de la prefekto Li Bing kaj lia filo de Ĉin-regno antaŭ pli ol 2 200 jaroj. Ĝis nun ĝi ankoraŭ ludas inundo-preventan kaj irigacian rolojn. La kanalo de Duĝjangjan komenciĝas ĉe la piedo de la monto Julej de Gŭanŝjan-gubernio, je 57 km. okcidente de Ĉengdu.

La monto Ĉingĉeng troviĝas proksime al Duĝjangjan. Sur la monto ĉie kreskas densa arbaro. Zigzagaj vojetoj kondukas al ĉiuj vidindejoj de la fama somerumejo. La monto, unu el la sanktejoj de la ĉina taoismo, surhavas plurajn taoismajn templojn. Tie cirkulas multaj legendoj.

Leŝan situas je 167 km. sude de Ĉengdu kaj estas antikva urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. Tie kuniĝas la riveroj Mingĝjang, Ĉingji kaj Dadu. Ĝi havas multajn vidindajn lokojn. Sur la vertikala bordo de la rivero ĉe la pitoreska Lingjun-monto estas giganta ŝtona budha statuo en sida pozo, 71 m. alta, kiun oni nomas "Granda Budho de Leŝan". Turistoj povas malsupreniri ĝis la piedoj de la statuo laŭ 9-kurba ŝtuparo instalita sur la rokmuro. Sur lia nuda pieda dorso povas sidi pli ol cent homoj. Oni priskribis ĝin figure: "La budho estas monto kaj la monto estas budho."


Turistoj povas ĝui la lokan gastronomion. La Siĉŭan-aj pladoj estas unu el la kategorioj de kuirartoj de Ĉinio kaj multe laŭdataj de gastronomoj. La Siĉŭan-aj pladoj karakteriziĝas per delikata preparado kaj diversaj gustoj. La Ĉengdu-aj pladoj estas ortodoksaj Siĉŭan-aj. Tie estas multaj famaj restoracioj kaj multaj famaj kuiristoj, ĉiu restoracio posedas unu aŭ plurajn pladojn karakterizajn. Krome, ankaŭ la diversaspecaj manĝaĵetoj de Ĉengdu ĝuas grandan famon kaj estas multe ŝatataj de ĉinaj kaj eksterlandaj turistoj.


Ĉengdu estas ankaŭ metia urbo kun longa historio. Turistoj plej ŝatas aĉeti tie Siĉŭan-ajn brokatojn, brodaĵojn, lakitajn objektojn, metiartaĵojn el arĝentaj dratoj, porcelanaĵojn tegitajn per bambuaj dratoj. Ili povas aĉeti en pentraĵo-vendejoj kaligrafaĵojn, pentraĵojn kaj sigelilojn faritajn de famaj pentristoj kaj kaligrafoj aŭ tiujn de popolaj pentristoj en malgrandaj budoj, kiuj estas tre taŭgaj por ornami ĉambrojn aŭ donaci al parencoj kaj amikoj, dum la prezoj estas multe malpli altaj.

*Pajla kabano de Du Fu*




*Bambukabla ponto ĉe Duĝjangjan*





*Surtegmenta tetrinkejo de nove konstruita turisma hotelo*




*Kvieta bambuaro*



*Ŭangĝjang-turo ĉe Ĝinĝjang-rivero*







*Pejzaĝo de Gujhu-lago*

*Templo de Li Bing kaj lia filo*





*Senkorna rinocero*




*Orienta praurso*


# Fosilioj de Ŝanŭang

Fotoj de **ĜENG GŬOĈING**

*Birdo*



*Morusfolio de Ŝanŭang*




*Fiŝo*




Ŝanŭang, 20 kilometrojn oriente de la gubernio Linĉju, Ŝandong-provinco, famiĝis pro siaj perfektaj fosilioj. La tieaj fosilioj estas speco-riĉaj kaj inter ili troviĝas fosiliaj vegetaloj, vertebruloj kaj grandaj mamuloj, kaj ankaŭ raraj fosiliaj ranoj, salamandroj, serpentoj kaj birdoj. Nun la nombro de la konstatitaj specoj superas 400, el kiuj triono estas de pereintaj specoj.

El la fosilioj iuj montras agoniajn pozojn de la animaloj. Estas klare distingeblaj la vejnoj de folioj, la ungoj kaj haroj de insektoj, la vejnoj de ties flugiloj, la membranecaj flugiloj de vespertoj kaj la lipharoj de ratoj.


La fosilioj de Ŝanŭang formiĝis antaŭ proksimume 18 milionoj da jaroj kaj estas signifas por malfermo de nova kampo studi pri praaj animaloj kaj vegetaloj kaj por ĝenerala esploro pri ili. Kaj cetere, ili servas kiel gravaj bazoj por esploroj pri la faŭno, geografio, klimato kaj komparo de stratumoj de orienta Ĉinio en mioceno.



*Ŝjŭan'u-ranido*



*Juna Ŝjŭan'u-rano*



*Matura Ŝjŭan'u-rano*

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

* 24-jara Wang Fu (teknikisto) dez. kor. tutmonde pri ĉ.t. kaj interŝ. pm., pk. kaj E-eldonaĵojn. Adreso: Shan Dan Junma 2 Chang, Lanzhou Junqu, Gansu-provinco, Ĉinio.

* Gekamaradoj el Wanxian Shi Esp.-Kurso dez. kor. tutmonde pri historio, politiko, literaturo ktp. esperante, angle aŭ germane. Adreso: Yi Jia Zhuang strato No.92-401, Wanxian Shi, Sichuan-a provinco, Ĉinio.

* Zhang Liping, 28j. bibliotekisto, deziras korespondi tutmonde esperante, angle pri ĉiu temo. Adreso: 601-shi 960-nong, Longshui Beilu 16, Shanghai 200232, Ĉinio.

* 27-j. teknikisto dez. kor. pri ĉ.t. kaj interŝ. bk., pm. kaj pk. esperante, germane kaj angle. S-ro Chen Xiang-hua, Dong Yang Shan Lu 94, Ganzhou-Shi, Jiangsi-prov., Ĉinio.

* Ĉinaj esperantistoj dez. kor. pri muziko, sporto kaj ĉiutaga vivo, kaj interŝanĝi pm, pk. kaj esperantaĵojn. Skribu al: Ma Shuguang (ŝoforo 27-j.), Taizhou Diwei Tongzhan Bu, Linhai, Zhejiang, Ĉinio; Su Shiming (komizo 22-j.), Linhai Shuichan Gongsi, Linhai, Zhejiang, Ĉinio.

* 26-jara Adam Seroczynski dez. kor. tm. pri turismo, antikva historio kaj parapsikologio, kaj kolekti bk. 59-220 Legnica Str, Hutnikow 11/5, Pollando.

POR LA 71-A UK

# Ĉu vi deziras scii pri la aranĝoj de loĝado kaj ekskursoj dum la kongreso?

de **LOKA KONGRESA KOMITATO**

Kara leganto, sube ni konigos koncernajn informojn pri la Kongreso, pri la aranĝoj de loĝado kaj ekskursoj (inkluzive antaŭ- kaj postkongresajn), prezoj kaj mendmanieroj.

## ĜENERALAJ INFORMOJ

### Adresoj

Konstanta adreso:

Universala Kongreso de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: (010) 36 15 39

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM

Adreso de LKK:

71a Universala Kongreso de Esperanto
P. O. Kesto 825
Beijing, Ĉinio
Telefono: 89 63 46
Telegramoj: CHEL BEIJING


### Kongresa Regularo

Neeblas disponigi al ĉiu kongresano la Kongresan Regularon, tamen la jenaj du reguloj devas esti atentataj.

Artikoloj 12 kaj 21 de la aktuala Kongresa Regularo de UEA tekstas jene:

"12. Al Universala Kongreso rajtas aliĝi ĉiu persono, kiu scias la Internacian Lingvon, kondiĉe ke li rekonu la Kongresan Regularon, submetiĝu al la leĝoj de la lando, kie okazas la Kongreso, kaj ke li faru nenion, kio povas malutili al la Kongreso. Tamen la Estraro de UEA post konsiliĝo kun LKK rajtas limigi la nombron de kongresanoj kaj difini la limdaton por aliĝo. La Es-

*La Granda Muro*



traro de UEA post konsiliĝo kun LKK havas la rajton rifuzi la partoprenon en la Universala Kongreso de kiu ajn persono, sen la devo doni al la aliĝinto motivon por tio."

"21. KKS devas atenti, ke neniu dokumento estu disdonata en la Kongreso sen antaŭa aprobo de UEA."

Se vi deziras disdoni dokumenton dum la Kongreso, nepre sendu ĝin kiel eble plej baldaŭ al UEA por peti aprobon.

### Vestaĵoj

La kongresanoj estas petitaj porti pli solenajn vestaĵojn por la inaŭguro kaj por la ĉefaj festaj programeroj (bankedo, balo, akcepto, teatro k. s.).

### Pagmanieroj

Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn dokumentojn al la sama instanco.

Prefere sendu viajn pagojn kaj mendojn al via landa peranto, kies kompleta listo troveblas en la Dua Bulteno. Se tiu mankas en via lando, bonvolu pagi al Rotterdam. Multe helpas nin, se vi uzas vian peranton.

Pagoj al Rotterdam: Bonvolu pagi al "Universala Kongreso de Esperanto", kiu estas malsama konto ol tiu de UEA, per unu el la jenaj metodoj:

— poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 Den Haag, je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto (adreso supre).

— banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe AmRo Bank, Postbus 949, 3000 DD Rotterdam. Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin rekte al la konstanta adreso. Grave: pagante per banka ĝiro aŭ ĉeko el ekster Nederlando, bonvolu aldoni 7,50 guldenojn pro la bankkostoj.

— poŝtmandato: sendu internaciajn kaj nederlandajn poŝtmandatojn rekte al la konstanta adreso.

— UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn k. c. kaj peti debeton al sia persona konto.

— monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn en nederlandaj guldenoj aŭ en valuto ŝanĝebla al nederlandaj guldenoj al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

Apartan atenton: LKK ne akceptas pagojn nek plenumas mendojn. Bonvolu ne sendi viajn pagojn kaj mendojn al LKK.

*La Imperiestra Palaco en Pekino*



### Kotizo

La kongresa kotizo rajtigas al aliĝinto partopreni en la laborkunsidoj, solenaĵoj kaj kelkaj kulturaj programeroj de la Kongreso, sed ne inkluzivas ekzemple la bankedon, ekskursojn aŭ loĝadon. La kotizo estas strikte persona. Aliĝinte al la Kongreso, unu persono ne rajtas transdoni sian kongresanecon al alia.

### Asekuro

La kongresa kotizo ne inkluzivas asekuron kontraŭ akcidento aŭ malsano de la aliĝinto dum la Kongreso. Necesas, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro. Diversaj specoj de vojaĝasekuro estas aranĝeblaj en multaj stacidomoj, vojaĝoficejoj, bankoj kaj flughavenoj, antaŭ la foriro.

La Kongreso mem ĉiuokaze repagas nek la aliĝkotizon, nek la antaŭpagitajn kongresajn aranĝojn (ekz. ekskursoj, bankedo k. s.), kiujn kongresano malmendas post la limdato, eĉ se tiu malmendo okazas pro malsaniĝo aŭ alia kaŭzo ekster la rego de la mendinto. Estas konsilinde, precipe kiam temas pri grandaj monsumoj, asekuriĝi kontraŭ nepartopreno. Pri tio oni konsiliĝu kun sia kutima asekuristo.

### Donacoj

La Kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-sube menciitaj celoj. Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro.



*Trajna vojaĝo en Ĉinio estas tre oportuna.*



*Stevardino disdonas memoraĵojn al pasaĝeroj.*

— Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj malfacilaĵoj.

— Adopta Kaso: helpas al kongresanoj el landoj kun transpagaj malfacilaĵoj.

— Blindula Kaso: helpas al kongresanoj-blinduloj.

—Literatura Kaso: subvencias la premiojn de la Belartaj Konkursoj.

**Mendilo**

Bonvolu zorge legi viajn mendilojn antaŭ ol plenigi ilin kaj forsendi kiel eble plej frue al via landa peranto aŭ al la konstanta adreso. Vi ricevos la suban folion kiel kvitancon. Se la kvitanco montras, ke vi ne pagis sufiĉe, bonvolu pagi la diferencon. Malgrandaj ŝuldoj povas esti ordigitaj en la kongresejo, sed vi devas fari tion antaŭ ol ricevi viajn dokumentojn.

**Insigno**

Kun la kongresaj dokumentoj vi ricevos la kongresan insignon, kiu montros viajn nomon, landon kaj kongresnumeron. Tiu insigno estas la sola oficiala atestilo pri kongresaneco. Kontrolistoj rajtas rifuzi eniron en la diversajn aranĝojn de la UK al tiuj, kiuj ne portas ĝin. Rajtas uzi la insignon nur tiu kies nomo aperas sur ĝi.

**Kongresa Libro**

Ni laŭeble pli frue eldoni la Kongresan Libron. En ĝi estos listo de kongresanoj kaj iliaj adresoj, ordigita laŭnumere. Krome estos listo de nuraj nomoj, ordigita unue laŭlande kaj poste laŭalfabete. La lando sub kiu kongresano eniras tiun indekson, estos tiu de la aktuala adreso.

**Libroservo**

Ĉi-jare Libroservo de la Kongreso estos sub la regado de la Esperanto-Sekcio de la Ĉina Internacia Librokomerca Kompanio. Bonvolu turni vin rekte al tiu sekcio per la adreso: P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio, se vi deziras vendi librojn en la kongresejo.

**Pakaĵovojaĝo**

Sekve de la rapida disvolviĝo de la turisma industrio de Ĉinio, la turismaj instalaĵoj ne povas kontentigi la bezonon. Precipe en la pinta turisma sezono de somero kaj aŭtuno ege malfacilas plenumi mendojn malfruajn kaj surlokajn. Tial la Ĉina Internacia Turisma Servo ĝenerale proponas al siaj klientoj partopreni en pakaĵovojaĝo, kiu estas malpli kosta ol unuopaj mendoj kaj pli oportuna por klientoj. ĈITS praktikas la pakaĵovojaĝon ankaŭ por la 71a UK.

La kostoj de la pakaĵovojaĝo ampleksas liton en norma hotelĉambro, tri manĝojn ĉiutage kun diverslokaj stiloj kaj trinkaĵoj (ekskluzive de vino), interpretadon kaj ĉiĉeronadon (ĉi-foje esperantlingvan), transportojn enurbajn kaj interurbajn, transportadon de valizo (ne pli ol 20 kilogramoj popersone), vizitojn al vidindaĵoj, vesperajn programerojn kaj peton pri vizo.

Oni devas mem pagi vestolavadon, hartondadon, taksion por privata uzo, poŝtadon, longdistancan telefonadon, telegrafadon, riparadon, kuracadon,

transportadon de troa valizo kaj diferencon pro loĝado en pli altklasa hotelo.

### Flugaj Karavanoj per CAAC

La Civila Aviada Administracio de Ĉinio (CAAC) estas la oficiala flugkompanio de la 71a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi donos favoran rabaton al kongresanoj kaj ofertos "sekuran, rapidan kaj komfortan" bonkvalitan servon.

La Universala Esperanto-Asocio ĉi-foje funkcias kiel aganta peranto de CAAC kaj organizos flugajn karavanojn al Pekino per CAAC-aviadiloj kaj plenumos mendojn de sidlokoj en CAAC-aviadiloj. Kongresanoj bonvolu turni sin rekte al UEA.

## LOĜADO

### Ĝenerala situacio

La ĉefurbo Pekino estas la plej alloga turisma loko de Ĉinio, sekve ege malfacilas rezervi litojn en hoteloj por la pinta turisma sezono de somero kaj aŭtuno. Por sukcesigi la Kongreson, LKK kaj la Ĉina Internacia Turisma Servo kaj la Ĉina Turisma Servo "Hua An" sukcesis rezervi plurajn centojn da litoj en la hoteloj, kiuj troviĝas 1,000 ĝis 5,000 metrojn for de la kongresejo. LKK sukcesis aranĝi ankaŭ malmultekostan loĝadon. Temas pri amasloĝejo en la dependa mezlernejo de la Ĉina Popola Universitato, kiu situas je kvaronhora piediro de la kongresejo. LKK disponigos unuavice al gejunuloj kaj kongresanoj el landoj kun pagaj problemoj.

### Loĝeblecoj

Ni jam rezervis litojn dum la periodo de la 25a de julio ĝis la 12a horo de la 3a de aŭgusto. La suba tabelo montras la kategoriojn de hoteloj, loĝkondiĉojn, limnombron kaj prezojn. La prezoj indikitaj en la kategorioj A-C estas por unu persono dum la kongresa semajno kaj ampleksas la liton en hotelo, tri manĝojn ĉiutage kun trinkaĵoj, ĉiujn enurbajn transportojn, tuttagan ekskurson al la Granda Muro, du duontagajn ekskursojn, transportadon de valizo, interpretadon kaj ĉiĉeronadon esperantlingvan kaj peton pri vizo. La prezo indikita en la kategorio Ĉ estas por unu persono dum la kongresa semajno kaj ampleksas la liton en la mezlernejo, matenmanĝon, transportadon de kaj al la flughaveno aŭ stacidomo, tuttagan ekskurson al la Granda Muro kun tagmanĝo, transportadon kaj tag- kaj vespermanĝon en la inaŭgura tago, transportadon de valizo kaj peton pri vizo.

| Kategorio | | Kondiĉoj | prezo en guldenoj |
|---|---|---|---|
| A | Unuaklasaj hoteloj | dulita ĉambro klimatizita kun televidilo, banejo kaj propra necesejo (300 litoj) | 2 600 |
| B | Mezklasaj hoteloj | dulita ĉambro klimatizita kun televidilo, banejo kaj propra necesejo (300 litoj) | 1 600 |
| C | Hotelo ICETE (mezklasa) | | |
| | C-1 | Apartamento kun duopalita kaj gasta ĉambroj klimatizitaj, televidilo, banejo kaj propra necesejo (7 litoj por 7 paroj) | 1 600 |
| | C-2 | Apartamento kun dulita kaj gasta ĉambroj klimatizitaj, televidilo, duŝejo kaj propra necesejo (62 litoj) | 1 465 |
| | C-3 | Apartamento kun tri litoj en du ĉambroj kaj elektra ventumilo, televidilo, duŝejo kaj propra necesejo (30 litoj) | 1 180 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ĉ | Amasloĝejo | Kvarlita ĉambro kun elektra ventumilo, komuna necesejo kaj du grandaj duŝaloj en la teretaĝo (300 litoj) | 400 |

Noto: Tiuj, kiuj mendis la loĝejon en la mezlernejo, povas tag- kaj vespermanĝi tie kontraŭ modesta kosto, kaj por tio necesas mendi tag- aŭ vespermanĝon laŭdate. Ĉiu manĝo kostas 5 guldenojn.

**Mendoj**

Tre zorge plenigu la mendilon kaj sendu ĝin senprokraste al Rotterdam. Ne forgesu surskribi vian kongresnumeron kaj indiki la daton kaj horon de via alveno kaj eliro kaj la numeron de via transportilo.

La turismaj servoj kaj LKK bonvenigos vin en la flughaveno aŭ stacidomo kaj veturigos vin al via loĝejo.

Ĉar la litoj estas limigitaj, bonvolu nepre indiki pliajn du alternativojn. Ni disponigos laŭvice de ricevitaj mendoj.

*Vestiblo de iu hotelo de Pekino*



Krom duontagaj ekskursoj, LKK ne akceptos surlokajn mendojn.

**Limdato**

Ĉiuj mendiloj atingu Rotterdam plej malfrue ĝis la 1-a de majo 1986. Ni ne garantias plenumon de malfrue ricevitaj mendoj, kvankam ni faros nian eblon.

**Malmendoj**

Eblas malmendi almenaŭ du monatojn antaŭ la Kongreso, alie la Kongreso ne repagos la antaŭpagitan sumon.

**BANKEDO**

La bankedo okazos en la bankeda salonego de la Popola Halo. Tio estos granda honoro por nia UK, ĉar ne estas facile havigi la permeson aranĝi bankedon tie. La bankeda salonego estas sufiĉe granda kun kapacito de kvin mil homoj. Se la mendintoj montriĝos ne sufiĉaj, ni eble bankedos aliloke. Prezo: 60 guldenoj.

Momente ni ankoraŭ ne povas informi vin pri la menuo, tamen vi povas antaŭvidi aŭtentikajn ĉinajn manĝaĵojn el 4 malvarmaj pladoj, 6 varmaj pladoj, supo kaj postmanĝa deserto. La prezo inkluzivas trinkaĵojn (bonkvalita ĉina brando, ĉina vino, biero kaj oranĝosuko).

Vegetaranoj bonvolu nepre indiki, por ke ni aparte mendu ĉinstilan kaj tre nutran vegetaran manĝon.

**EKSKURSOJ DUMKONGRESAJ**

**Ĝeneralaĵoj**

Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko kaj ĝia politika kaj kultura centro, havas pli ol naŭ milionojn da loĝantoj kaj areon de pli ol 16 800 kvadrataj kilometroj. Pekino kun historio de pli ol 3 000 jaroj estas konata kiel unu el la antikvaj urboj de Ĉinio kaj havas multajn antikvajn konstruaĵojn kaj ĉarmajn vidindaĵojn. Dum la kongresa semajno ni aranĝos por ĉiuj kongresa-

noj tuttagan ekskurson al la Granda Muro, unu el la mondaj mirindaĵoj. Ankoraŭ estos kvar duontagaj ekskursoj, el kiuj du (B 1 kaj B 2) jam estas inkluzivitaj en la pakaĵovojaĝo, dum la aliaj du (B 3 kaj B 4) estas mendeblaj. Tiuj, kiuj mendis la loĝejon en la mezlernejo, povas mendi duontagajn ekskursojn tute laŭ sia plaĉo.

Ekskurso A estos tuttaga kaj okazos en la 30a de julio. Ni forveturos de la loĝejo je la 8a matene, tagmanĝos aŭ ĉe la Granda Muro aŭ ĉe la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio kaj revenos proksimume je la 17a horo. Esperantlingva ĉiĉerono akompanos ĉiun aŭtobuson.

Ekskursoj B estos duontagaj kaj okazos antaŭtagmeze de la 28a, 29a kaj 31a de julio kaj la 1-a de aŭgusto. Ni startos de la loĝejo je la 8a kaj duono matene, tagmanĝos ie en la urbo kaj revenos al la kongresejo je la 14a horo. Esperantlingva ĉiĉerono akompanos ĉiun aŭtobuson.

**A Tuttaga Ekskurso al la Granda Muro**

Daŭro: 9 horoj

Transporto: buso

Manĝo (kun trinkaĵoj): inkluzivita

Eco: pajzaĝo — antikvaj konstruaĵoj — murogrimpado — valoraj elterigitaj objektoj — fotado kun ŝtonaj animaloj kaj homoj

Rimarkigo: Nepre portu taŭgajn ŝuojn por unuhora grimpado sur la Granda Muro kaj ne forgesu porti fotilon.

La Granda Muro komenciĝas oriente de Bohaimaro kaj etendiĝas okcidenten ĝis Jiayu-pasejo en Gansu-provinco, trapasante 5 provincojn kaj 2 aŭtonomajn regionojn de norda Ĉinio. Ni vizitos la Muron ĉe Badaling, kiu situas 70 kilometrojn nordokcidente de Pekino kaj estis strategie grava loko por defendi la ĉefurbon Pekino. Tie la Muro altas je 7,8 metroj, larĝas baze je 6,5 metroj kaj supre je 5,8 metroj, sur kiu 5 ĉevaloj aŭ 10 personoj povas marŝi paralele. De la Muro al la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio (1368-1644) estas bezonata 1-hora veturado. Tie troviĝas la tomboj de 13 Ming-dinastiaj imperiestroj en areo de 40 kvadrataj kilometroj. Unu el ili, nome Dingling, jam estis elfosita, kaj en la muzeo montriĝas valoraj elterigitaj objektoj uzitaj de la imperiestro kaj liaj du edzinoj.

**B Duontagaj ekskursoj**

**B-1 Somera Palaco**

Daŭro: 4 horoj



*Dajan-pagodo en Ŝjian*

Prezo: 55 guldenoj

Transporto: buso

Manĝo (kun trinkaĵoj): inkluzivita

Eco: Pejzaĝo — antikvaj konstruaĵoj

La Somera Palaco estis imperiestra palaco kaj ĝardeno kaj troviĝas 10 kilometrojn nordokcidente de Pekino kun areo de 290 hektaroj, kies tri kvaronojn okupas la lago. Ĝia tuta aranĝo estas majstroverko de la ĉina ĝardenistiko. La Longa Koridoro longa je 728 metroj, kiel jada ĉeno, interligas la monton, lagon kaj diversstilajn konstruaĵojn de la palaco. Promeni en la Longa Koridoro estas agrable.

**B-2 Tian'anmen-placo, Imperiestra Palaco**

Daŭro: 4 horoj

Prezo: 55 guldenoj

Transporto: buso

Manĝo (kun trinkaĵoj): inkluzivita

Eco: fotado — palacaj konstruaĵoj — trezoroj — antikvaj ĉinstilaj pentraĵoj

Tian'anmen-placo troviĝas en la centro de la urbo, kun Tian'anmen-pordego en la nordo, la Popola Halo en la okcidento, la Muzeoj de la Ĉina Revolucio kaj de la Ĉina Historio en la oriento kaj la Monumento de Popolaj Herooj kaj la Maŭzoleo de Prezidanto Maŭ en la sudo. Norde de Tian'anmen-pordego estas la impona Imperiestra Palaco, kie la lastaj feŭdaj dinastioj regis Ĉinion.

**B-3 Pekino 3000-jara, Ĉiela Altaro**

Daŭro: 4 horoj

Prezo: 55 guldenoj

Transporto: buso

Manĝo (kun trinkaĵoj): inkluzivita

Eco: urbotraveturado — mirindaj konstruaĵoj

Ni veturos sur iuj novaj kaj malnovaj stratoj de Pekino kaj konatiĝos kun la pasinto kaj nuno de Pekino. Traveturinte la straton Qianmen, unu el la homplenaj butikumaj centroj, ni atingos la Ĉielan Altaron. La altaro estis konstruita en 1420, kie la imperiestroj kultis la ĉielon kaj preĝis por riĉa rikolto, kaj nun fariĝis tre vidinda loko. Ĝi estas la plej grandioza el la templaj konstruaĵoj de Ĉinio. Tie troviĝas mirinda sontranssenda muro.

**B-4 Lamaista Templo Yonghegong, Parko Jingshan**

Daŭro: 4 horoj

Prezo: 55 guldenoj

Transporto: buso

Manĝo (kun trinkaĵoj): inkluzivita

Eco: antikvaj konstruaĵoj — giganta budha statuo — panorama vido de la urbo

Yonghegong estis konstruita en 1694. Ĝi estas la plej bone konservita lamaista templo en Pekino. La giganta statuo de Budho Majtreja altas 26 metrojn (18 metrojn super la tero kaj 8 metrojn sub ĝi). La Parko Jingshan renomas pro siaj kvin belaj pavilonoj sur la kvin montpintoj de kie oni havas panoraman vidon de la tuta urbo.

## ANTAŬ- KAJ POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ

Ĉinio havas skriban historion jam de kvar mil jaroj. Laŭ arkeologiaj materialoj, sur tiu ĉi tero vivis primitivaj homoj antaŭ miliono da jaroj. Ĉinio havas pli ol miliardon kaj tridek ok milionojn da loĝantoj el pli ol kvindek naciecoj, kiuj havas siajn proprajn tradiciojn kaj kutimojn.

Ĉinio havas vastan teritorion kun areo de ĉ. 9 600 000 kvadrataj kilometroj. La abundaj historiaj objektoj kaj ravaj naturaj belaĵoj de diversaj gustoj ornamiĝas dise tra la lando.

La realiĝo de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto 1986 en Pekino havigôs al vi okazon konatiĝi kun Ĉinio, ekzotika kaj mistera por plej multaj esperantistoj de la mondo, kaj pli penetre rilatiĝi kun ĉinoj.

En kunlaboro kun la Ĉina Internacia Turisma Servo (ĈITS), ni aranĝos 3 antaŭkongresajn kaj 6 postkongresajn ekskursojn al diversaj partoj de Ĉinio. En preskaŭ ĉiuj vizitotaj urboj vi renkontos lokajn esperantistojn. Necesas preni la pakaĵovojaĝon.

### Mendoj

Tre zorge plenigu la specialan mendilon por antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj kaj klare indiku, kiun ekskurson vi preferas. Ne forgesu noti vian kongresnumeron kaj la daton kaj horon de via alveno kaj eliro kaj la numeron de via transportilo. Neeblas mendi surloke. Se vi restos pliajn tagojn en Ĉinio, vi devas ekstre pagi laŭtage.

Se la mendoj de iu ekskurso ne atingos la minimuman nombron, ni nuligos ĝin. Ni petas vian afablecon indiki alternativon.

### Limdato

Ĉiuj mendiloj atingu Rotterdam plej malfrue ĝis la 1-a de majo 1986. Ni ne garantias plenumon de malfrue ricevitaj mendoj, kvankam ni faros nian eblon.

### Malmendoj

Malmendoj devas atingi Rotterdam almenaŭ du monatojn antaŭ la Kongreso, alie la Kongreso ne repagos la antaŭpagitan sumon.

### Antaŭkongresaj ekskursoj

**AE-1** Guangzhou — Wuhan — Yangzi-rivero — Chongqing — Chengdu — Pekino

Daŭro: 14 tagoj

Prezo: 2550 guldenoj

Transporto: aviadilo, luksa ŝipo, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 100

Itinero:

| | |
|---|---|
| 07 12 | Alveno al Guangzhou tra Hongkongo |
| 07 13 | Flugo de Guangzhou al Wuhan |
| 07 14 | En Wuhan |
| 07 15 | Enŝipiĝo en la ŝipon "Yangzi" |
| 07 16 | Ŝip-vojaĝo al Chongqing laŭ Yangzi-rivero |
| 07 16-18 | Ŝip-vojaĝo al Chongqing laŭ Yangzi-rivero |
| 07 19 | Alveno al Chongqing |
| 07 20-21 | En Chongqing |
| 07 22 | Flugo de Chongqing al Chengdu |
| 07 23-24 | En Chengdu |
| 07 25 | Flugo de Chengdu al Pekino |

Noto: Oni devas mem aranĝi flugon aŭ trajnveturon de Hongkongo al Guangzhou.

Guangzhou, la ĉefurbo de Guangdong-provinco, situas en la centra parto de la provinco. Ĝi estas la plej granda urbo en suda Ĉinio, bela kaj fantazia, kun ĉarmaj floroj tutjare, unika kuirado kaj longhistoria kulturo. Wuhan, la ĉefurbo de Hubei-provinco, konsistas el tri urboj: Wuchang, Hankou kaj Hanyang. Ĝi situas en la meza parto de Yangzi-rivero kaj estas grava nodo de tera kaj akva trafikoj kaj prospera komerca centro. Yangzi-rivero estas monde konata, kaj la tri gorĝoj ege ravas turistojn. Chongqing estas fama "monturbo" en nia sudokcidento. Chengdu estas la ĉefurbo de Sichuan-provinco konata kiel "la lando de riĉo". Tiu antikva urbo famas pro brokaĵoj kaj kuirado. La Pajlotegmenta Kabano de Du Fu, la majstra poeto de Tang-dinastio (618—907 p. K.) estas loko nepre vizitata de turistoj.

**AE-2** Kunming — Chengdu — Lasao — Chengdu —Pekino

Daŭro: 11 tagoj

Prezo: 2685 guldenoj

Transporto: aviadilo, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 30

Itinero:

| | |
|---|---|
| 07 15 | Alveno al Kunming tra Hongkongo |
| 07 16 | En Kunming |
| 07 17 | Flugo de Kunming al Chengdu |
| 07 18 | Flugo de Chengdu al Lasao |
| 07 19-22 | En Lasao |
| 07 23 | Flugo de Lasao al Chengdu |
| 07 24 | En Chengdu |
| 07 25 | Flugo de Chengdu al Pekino |

Noto: Oni bezonas mem aranĝi flugon de Hongkongo al Kunming.

Kunming estas printempa urbo sur la altebenaĵo en nia sudokcidento. La Ŝtona Arbaro estas fama vidindejo. Lasao, la politika kaj religia centro de Tibeto, sin trovas sur la altebenaĵo de pli ol 4,000 metroj super la marnivelo. Pudala-palaco en la nordokcidenta parto de la urbo estas fama konstruaĵaro de palacoj kaj kasteloj en Ĉinio kaj montras la belan arton de la antikva tibeta arkitekturo. Tie konserviĝas multe da tre valoraj kulturaj restaĵoj. Lasao estas alloga por multaj turistoj, sed por ĝin viziti, oni devas havi bonan sanon.

**AE-3** Pekino — Xi'an — Nankino — Yangzhou Nankino — Pekino

Daŭro: 7 tagoj

Prezo: 1755 guldenoj

Transporto: aviadilo, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 100

Itinero:

| | |
|---|---|
| 07 19 | Alveno al Pekino |
| 07 20 | Flugo de Pekino al Xi'an |
| 07 21 | En Xi'an |
| 07 22 | Flugo de Xi'an al Nankino |
| 07 23 | En Nankino |
| 07 24 | Vizito al Yangzhou kaj reveno |
| 07 25 | Flugo de Nankino al Pekino |

Xi'an situas en la centro de Ĉinio kaj estas la ĉefurbo de Shaanxi-provinco. Ĝi servis kiel la ĉefurbo de 10 dinastioj en la historio kaj estis la starto de la fame konata "Silka Vojo". Inter la sennombraj valoraj elterigitaj restaĵoj, la Muzeo de la Elterigita Terakota Legio de Qin Shi Huang (la unua imperiestro de Qin-dinastio, 221-206 a. K.) estas la plej impona kaj konata kiel unu el

la 8 mondaj mirindaĵoj. Nankino estas la ĉefurbo de Jiangsu-provinco kaj havas historion de pli ol 2 400 jaroj kaj servis kiel ĉefurbo de pluraj feŭdaj dinastioj. La Maŭzoleo de D-ro Sun Yatsen kaj la pontego super Yangzi-rivero estas vizitindaj lokoj. Yangzhou estas fama antikva urbo kaj sin trovas apud Yangzi-rivero kaj estas trapasata de la Granda Kanalo. Ĝiaj konstruaĵoj havas apartan nuancon de la delto de Yangzi-rivero.

**Postkongresaj ekskursoj**

**PE-1** Pekino — Hangzhou — Shaoxing — Hangzhou — Hongkongo

Daŭro: 4 tagoj

Prezo: 955 guldenoj

Transporto: aviadilo, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 80

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 03 | Flugo de Pekino al Hangzhou |
| 08 04 | En Hangzhou |
| 08 05 | Vizito al Shaoxing |
| 08 06 | Flugo de Hangzhou al Hongkongo (ĈITS liveros bileton) |

La itala vojaĝisto Marko Polo laŭdis la urbon Hangzhou kiel "la plej belan kaj grandiozan urbon en la mondo". Hangzhou ĝuas renomon pro la pitoreska Okcidenta Lago kaj silkaĵoj. La urbo Shaoxing distancas de Hangzhou je duhora veturado per buso kaj estas la hejmloko de la fame konata verkisto Lusin, kiu tre simpatiis Esperanton. Vi ĝuos tie la tipan pejzaĝon de akva lando en la sudo, kaj admiros la lokan bonodoran rizvinon.

**PE-2** Pekino — Nankino — Yangzhou — Nankino — Ŝanhajo — Suzhou — Ŝanhajo

Daŭro: 7 tagoj

Prezo: 1555 guldenoj

Transporto: aviadilo, trajno, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 50

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 03 | Flugo de Pekino al Nankino |
| 08 04 | En Nankino |
| 08 05 | Flugo de Nankino al Ŝanhajo |
| 08 06 | En Ŝanhajo |
| 08 07 | Vizito al Suzhou |
| 08 08 | Reveno al Ŝanhajo |
| 08 09 | Eliro el Ŝanhajo |

Ŝanhajo, la plej granda centro de industrio, scienca esplorado kaj ekstera komerco en Ĉinio, estas multe vizitata de turistoj. Oni nomas la urbon Suzhou "Venecio en la Oriento". Ĝi famas pro siaj delikataj ĝardenoj, silkaĵoj, ventumiloj kaj manĝaĵoj.

**PE-3** Pekino — Guilin — Hangzhou — Shaoxing — Hangzhou — Pekino

Daŭro: 8 tagoj

Prezo: 1745 guldenoj

Transporto: aviadilo, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 80

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 03 | Flugo de Pekino al Guilin |
| 08 04-05 | En Guilin |
| 08 06 | Flugo de Guilin al Hangzhou |
| 08 07 | En Hangzhou |
| 08 08 | Vizito al Shaoxing |
| 08 09 | Flugo de Hangzhou al Pekino |
| 08 10 | Eliro el Pekino |

La subtropika urbo Guilin ĝuas la reputacion de la plej bela pejzaĝo de la lando. Belegaj montpintoj pompe staras en diversaj fantaziaj formoj. En kavernoj troviĝas sorĉaj stalaktitoj kaj stalagmitoj. Lijiang-rivero irante ĉirkaŭ amaso da montetoj formas ĉarman pejzaĝon de verdaj montetoj, kristal-klara akvo.

**PE-4** Pekino — Dalian — Shenyang — Harbin — Pekino

Daŭro: 9 tagoj

Prezo: 1335 guldenoj

Transporto: aviadilo, trajno, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 50

(*Daŭrigo sur p. 63*)

# Pri moroj en Tibeto

de **LU GŬOJŬAN**

El la 56 naciecoj de Ĉinio, la tibeta nacieco havas plej multajn kaj interesajn morojn kaj kutimojn. Sennombraj etiketoj, moroj kaj tabuoj akompanas ĉiun tibetanon de lia naskiĝo ĝis lia morto. Neniu nacieco povas kompari siajn festojn kun tiuj de la tibeta nacieco ĉu kvante ĉu enhave.

La tibetaj beboj naskiĝis plejparte ne en akuŝejo aŭ hejmo. De jarcentoj la paŝtejaj virinoj akuŝis ekster tendo malgraŭ ventego kaj neĝego. En la agrikultura regiono la virinoj naskis ofte en bovostalo kaj ŝafostalo. Sed tuj post sia naskiĝo la bebo (precipe virseksa) ricevis zorgon multe pli bonan ol sia patrino. Parencoj kaj amikoj venas kun donacoj por gratuli la novnaskiton en la tria tago post ĝia naskiĝo (la inseksan en la kvara tago). Urbanoj devas donaci sekalvinon, buteran teon, veston kaj ĉapon por la bebo. Krom vino kaj teo kamparanoj devas donaci ankaŭ plensakon da sekalfaruno kaj pecon da freŝa butero. Enirinte domen, gastoj el urbo devas unue donaci al la akuŝintino kaj ŝia bebo blankan silkan rubandon kaj poste gratuli la naskiĝon de la bebo. Krom tio parencoj el kamparo devas pinĉi per dika kaj montra fingroj iometon da sekalfaruno kaj ĝin meti sur la frunton de la bebo por esprimi al ĝi bondezirojn. Unu monaton post la naskiĝo de la bebo oni devas fari vojaĝan riton por ĝi en bonaŭgura tago. La patrino kaj bebo en novaj vestoj, akompanataj de parencoj bele vestitaj, pilgrimas al templo por peti feliĉon de bodisatvo. Post tio ili vizitas familion de feliĉaj parencoj aŭ amikoj (ekz., tiun kun tri generacioj), dezirante, ke ankaŭ la bebo havu tian familion. Estas tre solene doni nomon al la bebo, kion plenumas ofte viva budho (altranga bonzo) kaj aŭtoritata maljunulo. Se la bebo estas malsanema, ĝiaj gepatroj opinias ĝian nomon nefeliĉa kaj iras kun ĝi al la viva budho por peti lin doni alian nomon.

Post sia maturiĝo oni devas ellerni diversajn etiketojn. Prezenti blankan silkan rubandon estas la plej populara etiketo. Oni devas donaci tian rubandon en edziĝa kaj funebra ceremonioj, festoj, vizito al pliaĝuloj kaj budhostatuoj, ĉe adiaŭo al iu pro lia vojaĝo k. a. por esprimi sian pian saluton kaj sinceran bondeziron. Silka rubando ordinare estas blanka, ĉar la tibetanoj rigardas la blankan koloron kiel simbolon de feliĉo. Troviĝas ankaŭ silka rubando kun blua, blanka, flava, verda kaj ruĝa koloroj. La blua koloro simbolas la ĉielon, la blanka — nubon, la verda — riverakvon, la ruĝa — la ĉielan dion protektantan budhismon kaj la flava — la teron. La kvinkolora silka rubando estas la plej valora donaco prezentata nur al bodisatvo kaj proksimaj parencoj. Silka rubando originas en landinterno. En la 13-a jarcento Basiba, la patriarko de Saĝja-sekto, post aŭdienco ĉe Kublaj-Ĥano, la unua imperiestro de Jŭan-dinastio, kunportis la unuan blankan silkan rubandon kun bildo de la Granda Muro kaj ideografiaĵoj "Bonŝanco kaj Feliĉo". Ekde tiam furoras blanka silka rubando.

Ankaŭ surgenue klini kapon al la tero estas ofte videbla etiketo. La kap-klinado havas tri manierojn, t.e. profunda klino, malprofunda klino kaj klino kun bruo. En la templo Daĝaŭ, Potala-palaco kaj aliaj lokoj de budhisma aktivado ofte svarmas homoj, kiuj levas siajn kunmetitajn manojn super la kapon, poste mallevas ilin preter la frunto ĝis antaŭ la brusto kaj tion ripetas trifoje. Post tio ili preĝas kuŝante surtere kun manoj rekte etenditaj, poste ili stariĝas kaj ripetas tion. Nun la krudaj ŝtonplatoj antaŭ la templo estas jam glate poluritaj de tiaj preĝantoj. Oni klinas sian kapon surteren kun bruo ofte en templo. Ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junuloj ĉu maljunuloj, ĉiuj faras tri vertikalajn svingojn de la kunmetitaj manoj, iom klinante la buston; poste ili sin klinas al la piedoj de budhostatuo kaj tuŝetas ilin kun bruo per la kapo por esprimi sincerecon kaj piecon.


Se iu gastas ĉe tibetano en festo, ĉi tiu prezentas al li sekalvinon. La gasto devas unue trinki tri plenbuŝojn da ĝi kaj poste eltrinki la reston. Alie, la gasti-

ganto estus malkontenta, opiniante lin malĝentila aŭ malrespekta al li. Tetrinkado estas ordinara etiketo. Post kiam la gasto sidiĝas en la domo, la mastrino aŭ ŝia filo aŭ filino portas al li buteran teon, kiun tuj trinki ne decas, sed li devas trinki, kiam la gastiganto mem ĝin prezentas al li. Kiam oni renkontas respektindan personon, li devas demeti sian ĉapon, ĝin teni en mano proksime al la tero kaj sin klini je 45 gradoj. Por esprimi sian respekton al iu, oni kutime aldonas "la" post lia nomo. Estas ĝentile manĝi ne en plena buŝo, maĉi kaj trinki sen bruo, preni manĝaĵon ne trans plado, cedi vojon al aliaj en irado, saluti aliajn en renkontiĝo, ne preni sidlokon de ĉefa gasto ĉe bankedo kaj sidi kun deca pozo. Ĉio ĉi estas ĉiutagaj etiketoj de la tibetanoj.

Edziĝo estas grava afero por plenaĝuloj. La edziĝa ceremonio havas serion da rigoraj procedoj. Peti la konsenton de la gepatroj de la fraŭlino pri la geedziĝo ja estas la unua farenda procedo. Oni devas anticipe peti la opinion de sortodivenisto, ĉu la gefraŭloj povos gefianĉiĝi laŭ la horoskopaj konsideroj de 12 bestoj. Se jes, la gepatroj de la fraŭlo donacas blankan silkan rubandon al tiuj de la fraŭlino kaj oficiale petas ilian aprobon. Se ambaŭ flankoj konsentas la aferon, ili do komisias al iu elekti bonaŭguran daton por fari edziĝateston, kiu estas verkita kutime en formo de poemo por facile voĉlegi. En fianĉiĝa tago du ekzempleroj de la atesto kuŝas en longpieda telero. Atestanto de unu flanko laŭtlegas unu el ili, dum tiu de la alia flanko serioze kontrolas la alian. Poste ili publike stampas ilin per sigeliloj de ambaŭ familioj kaj donas po unu al la patroj de ambaŭ flankoj. Antaŭtage de la edziĝa ceremonio la familio de la fraŭlo devas donaci kompleton da belaj vestoj, braceletojn kaj aliajn ornamaĵojn silke pakitajn al la familio de la fraŭlino, por ke ŝi vestu sin per ili. Ankaŭ la familio de la fraŭlino devas doni la doton antaŭ la nupto. Kaj la kvanto de la doto varias laŭ la financa situacio, sed estas nemalhaveblaj unu kupra budhostatueto, unu ekzemplero de budhisma sutro kaj unu malgranda stupao. Legendo diras, ke en la sepa jarcento, kiam princino Ŭenĉeng de Tang-dinastio edziniĝis al Sunzankampo, ŝi kunportis tiujn tri objektojn. En edziĝa tago la novedzo devas sendi personojn rajdantajn kun graveda ĉevalino bele ornamita por bonvenigi la novedzinon. Post kiam ili eniras la domon de la novedzino, ili metas koloran sagon sur la dorson de la novedzino, kio simbolas, ke ŝi jam fariĝis membro de la familio de la edzo, poste jadon (rigardatan de la tibetanoj kiel animo) sur ŝian kapon por simboli, ke la novedzo jam donis al ŝi sian animon. Kiam la novedzino forlasas sian hejmon, iu el ŝia familio, kun kolora sago en unu mano kaj ŝaffemuro en la alia, senĉese kriegas: "Nian feliĉon ne forportu!" ĝis la novedzino rajdas malproksimen. La tradicia ceremonio por la novedzino eniri la domon de la noved-

*Tendoj sur festa stepo*

Foto de **ĈENG MINGGUJ**



zo estas tre malsimpla. Ŝi devas kanti kanton kaj prezenti blankajn silkajn rubandojn unu post alia ĉe deĉevaliĝo, eniro tra pordo, supreniro al la dua etaĝo kaj eniro en salonon. Enirinte la salonon, ŝi havas sidlokon dekstre de sia novedzo. La bonvenigantoj kaj akompanantoj eniras la salonon kaj sidiĝas laŭvice. Poste la novgeedzoj prezentas *Ĉjema,* objekton simbolantan feliĉon, proponas toston, donacas blankan silkan rubandon al budhostatuo kaj al la gepatroj kaj pendigas tian rubandon sur kolono. Por esprimi sian gratulon, la ĉeestantoj kantas *Ŝjeĉing,* kaj la gastigantoj prezentas al ili blankan silkan rubandon por esprimi sian dankon. Post tio la novedzo akompanas sian novedzinon al la edziĝa ĉambro kaj la aliaj komencas ĝui la festenon. La edziĝa ceremonio daŭras tri tagojn.

La sepultaj ceremonioj de la tibetanoj estas distingiĝaj. Oni transportas la kadavron de mortinto al kamparo por nutri karnovorajn vulturojn. Tiu ceremonio estas nomata ĉiela sepulto. En Tibeto ne troviĝas funebra salono. La funebra ceremonio antaŭ la sepulto iras hejme. La funebra procesio komenciĝas kutime ĉe matenkrepusko. En Tibeto oni sepultas ankaŭ per akvo, tero, fajro kaj stupao. Sepulto per stupao estas la plej honora. Se prestiĝa viva budho mortis, oni ŝmiras lian kadavron per salakvo. Post kiam la kadavro estas sekigita de vento, oni ŝmiras ĝin per balzamo kaj aliaj valoraj medikamentoj kaj eterne konservas ĝin en stupao.

La tibeta nacieco havas interesajn festojn. Preskaŭ en ĉiu monato troviĝas unu aŭ du festoj. Krom la naciecaj, estas ankaŭ multaj religiaj festoj. Iujn aktivadojn kun naciaj moroj oni nomas ankaŭ festoj, ekz. ekskurso al antaŭurba pitoreskejo kaj ĉevalkonkurso.

El la abundaj festoj la Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro (egala al la Printempa Festo de la hanoj) estas la plej solena por la tibetanoj. Ekde la unuaj tagoj de la 12-a monato laŭ la tibeta kalendaro ĉiuj familioj preparas frititajn kukojn el butero kaj faruno, kiuj odoras je butero ĉie tra stratoj kaj vilaĝoj. Antaŭ la Novjara Tago ĉiuj familioj pretigas buŝelon da sekalfaruno, bakitaj sekalgrajnoj kaj sovaĝaj fruktoj kun sekalspikoj, rinantoj kaj butera ŝafkapo en la supro por festi la riĉan rikolton de la pasinta jaro kaj deziri bonan veteron en la nova jaro. Antaŭ la vespermanĝo de la lasta tago de la pasinta jaro ĉiuj familioj purigas sian domon kaj faras bonaŭgurajn signojn sur la centra muro de la kuirejo per seka faruno, kaj signojn de feliĉo sur la pordo per kalka pulvoro. Iuj familioj faras multe da blankaj punktoj sur siaj domtraboj por deziri longan vivon kaj riĉan rikolton.

*Pikniko en festotago*

Foto de **LIŬ TJEŜENG**




Tiun vesperon ĉiuj familioj manĝas kuiritajn pastecôjn el faruno ene kun ŝtonetoj, kapsiko, lignokarbo aŭ ŝafharoj. La pasteĉo kun ŝtonetoj signifas, ke la manĝinto havos malmolan koron venontjare, tiu kun lignokarbo — malican koron, tiu kun kapsiko — langon pikan kiel tranĉilo, kaj tiu kun ŝafharoj — molan koron. Tiuj, kiujn trafis tiaj objektoj, devas tuj elbuŝigi ilin por montri. Tio vekas ridegon de la tuta familio. En la sekva tago la dommastrino devas ellitiĝi la unua, prenas la unuan sitelon da putakvo kaj doni manĝaĵon al brutoj. Post tio ŝi devas voki siajn familianojn. Ĉiuj familianoj sidas laŭ la aĝo. La plejaĝulo alportas buŝelon. La aliaj pinĉas po kelkajn grajnojn kaj ilin supren disĵetas por kulti dion, poste ili enbuŝigas iom da grajnoj. Tiam la plejaĝulo esprimas bondeziron al siaj familianoj laŭvice, kaj la lastaj respondas: "Bonan sanon, eternan feliĉon, festan kunestadon ankaŭ en la venonta Novjara Tago!" En la Novjara Tago oni kutime festas hejme kaj ne faras interviziton. En la sekva tago oni komencas viziti parencojn kaj amikojn, kun novjaraj salutoj. Tio daŭras 3-5 tagojn. Ĉe renkontiĝo viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj, ĉiuj devas diri: "Feliĉan novjaron!" Dum la novjara festo ĉie en la urboj kaj la kamparo videblas homamasoj dancantaj kaj prezentantaj tibetajn teatraĵojn. La paŝtistoj eĉ bruligas kampfajron, ĉirkaŭ kiu ili kantas kaj dancas ĝis mateniĝo.

En la fino de junio kaj la komenco de julio estas Ŝjŭedun-festo. "Ŝjŭe" en la tibeta lingvo signifas jahurton kaj "dun" regalon. Kiam aperas matenruĝo ĉe la orienta montaro kaj la poploj ankoraŭ estas vualitaj de nebulo, loĝantoj de Lhasa jam atendas antaŭ la pordo de Lobu-parko, la iama somera palaco de Dalailamao. Tuj kiam la peza pordo malrapide malfermiĝas, ili torentas en ĝin kaj komencas festan aktivadon. Antaŭ la 17-a jarcento Ŝjŭedun-aktivado estis tute religia. Tiam laŭ la disciplino de budhismo la lamaoj estis malpermesitaj eliri dum dekoj da someraj tagoj. Ricevinte la permeson, ili tuj malsupreniras de la monto kaj almozpetas pri jahurto de loĝantoj. Jen la origino de Ŝjŭedun-festo. En la meza periodo de la 17-a jarcento Ŝjŭedun-festo fariĝis pli kaj pli enhavoriĉa. Oni komencis prezenti tibetajn teatraĵojn kaj regule festis la feston. Post la demokratia reformo en 1959 Ŝjŭedun-festo fariĝis tre gaja por la ordinaraj tibetaj loĝantoj. En la festo oni povas ĝui, krom tibetaj teatraĵoj, ankaŭ belajn programerojn de aliaj artaj trupoj. Por la festo la komerca departemento de la registaro liveras diversajn varojn kaj starigas vendobudojn, kio pli vigligas kaj gajigas la feston.

En Tibeto estas ankaŭ Banfesto. En la sepa monato laŭ la tibeta kalendaro, post la pluva sezono, venas belaj sunbrilaj tagoj sur la altebenaĵo. En tiuj tagoj la tibetanoj, ĉu maljunuloj ĉu infanoj, iras al rivero kaj sin malvestas por ludi en akvo. La maljunuloj sentas sin multe pli junaj. Ili kaŭrante sur ŝtono lavas sian kapon, poste ili nudigas sian supran korpon kaj enakviĝas por sin bani. Ban-festo daŭras ĉ. unu semajnon. Oni lavas ne nur la kapon kaj korpon, sed ankaŭ vestojn kaj litaĵojn. Ili iras al rivero kun manĝaĵoj, vino kaj teo je la sunleviĝo kaj revenas hejmen kontentaj nur post la apero de steloj.

En la tibeta kamparo, krom la Novjara Tago, ankaŭ Ŭanggŭofesto estas tre gaja. Ĝi celas festi riĉan rikolton. "Ŭang" en la tibeta lingvo signifas kampon, "gŭo" ĉirkaŭiradon. La festo ne havas fiksan daton. Ordinare ĝi okazas en grenmaturiĝaj tagoj. Viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj en novaj vestoj, vektoportante "riĉrikoltan pagodon" el sekalo kaj tritikaj spikoj kaj tenante kolorajn flagojn kaj sloganrubandojn, paradas inter kampoj en tamtamado, tamburado, kantado kaj dancado. Tiun tagon tibetanoj baniĝantaj en riĉrikolta ĝojo konkursas pri ĉevalkuro kaj sagopafado, prezentas tibetajn teatraĵojn kaj piknikas por festi sian rikolton.


La tibeta nacieco kun longa historio longe vivas sur la altebenaĵo multe izolita de la landinterno. Ĝuste tiu speciala medio estigis ĝiajn originalajn morojn kaj kutimojn. Post la paca liberigo de Tibeto, tiuj moroj kaj kutimoj estas sufiĉe respektataj kaj protektataj. Samtempe kun la daŭra progreso de la socio, scienco kaj kulturo, la tibeta popolo iom post iom forlasis iujn superstiĉajn kaj nesanajn partojn el ili.






*En la Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro junulinoj prezentas vinon al maljunulino.*
Foto de **TUDENG**

*Pafado en rajdado* Foto de **TUDENG**







*Tibeta virino en festa kostumo*
Foto de **LIŬ TJEŜENG**



*Lhasa-rivero en Ban-festo*
Foto de **MA ĜINGĈIŬ**


*Parko en festotago* Foto de **ŜJU PENG**








*Infano en Ban-festo*
Foto de **LIŬ TJEŜENG**



*Rajdanto en antikva kavalira kostumo en Ŭanggŭo-festo*
Foto de
**ĈENG MINGGUJ**




*Preparo de milifaruna kaĉo*

EL REALA VIVO DE ĈINIO

# Pekin-gustaj manĝaĵoj

Fotoj de **LAŬ BAJ**



*Kortegaj kukoj preparataj*

*Ordinaraj manĝaĵoj en farado*





*Kaĉo kun faboj kaj bakita farunaĵo*



*Manĝo baldaŭ finota*

Nun la pekinanoj pli atentas la koloron, guston kaj nutrecon de manĝaĵoj. Tamen la tradiciaj pekin-gustaj manĝaĵoj ankoraŭ estas vaste preferataj. Ili devenis de la popolo, poste populariĝis en urboj kaj iuj el ili eĉ eniris en kortegon. Ili estas faritaj per vaporumado, fritado, bakado kaj rostado. Nun en Pekino oni vendas pli ol 30 specojn de tiaj manĝaĵoj.

La butiko Juŝanĝaj, kiu antaŭe preparis kukojn speciale por la kortego, situas en iu strateto. Nun ĝi servas al ordinaraj pekinanoj. Apud iu aŭtovoja trefkruciĝo estas butiko nomata "Milifaruna Kaĉo de Familio Li", en kiu tri generacioj de familio Li servas al klientoj. La milifaruna kaĉo ekzistas jam de pli ol 100 jaroj. Ĉiutage pli ol mil homoj ĝuas ĝin en la butiko.

*Bongusta milifaruna kaĉo*





Vendo de glufarunaĵo kun jujuboj




Kratagfruktoj kun kando



Matenmanĝo



*Maizfaruna manĝaĵo en farado*



*Maizfaruna manĝaĵo en farado*

*Kukoj faritaj el piza faruno*



# Enigmo de la subtera palaco de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio


Antaŭ pli ol 60 jaroj iu franco vojaĝis en Ĉinio. Kiam li vidis la imponan teran tombon de la unua ĉina imperiestro (259—210 a. K.) en formo de piramido ĉe la piedo de Liŝan-monto en Lintong de Ŝenŝji-provinco, li diris kun miro: "Ĝi estas la plej majesta el la antikvaj tomboj nun ekzistantaj en Ĉinio."

La tombo de pli ol 2 000 jaroj, kiun la franco admiris, aspektis jam ne kiel antaŭe. La natura erozio kaj la homa detruo reduktis ĝian alton de 115 metroj al 51.5 metroj kaj ĝian perimetron de la bazo de pli ol 2 000 metroj al iom pli ol 1 700 metroj.

Historia libro notis, ke tuj post sia surtroniĝo la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio komencis konstruigi sian maŭzoleon ĉe Liŝan-monto. Post kiam li aneksis la aliajn regnojn, li rekviziciis pli ol 700 000 homojn por plua konstruado. La tuta laboro daŭris 37 jarojn. Oni konstruis tre luksan palacon subtere kaj multajn surterajn halojn, turojn kaj pordegojn interligitajn per galerioj kaj garnitajn per duoblaj muroj, trabaroj kaj peristilo kun gravuraĵoj kaj pentraĵoj. La maŭzoleo kovras areon 127-oblan kiom Vatikano. En skalo kaj arto de konstruado ĝi povas esti komparata kun la Granda Muro kaj la Granda Kanalo de Ĉinio, piramidoj de Egiptio kaj aliaj elstaraj antikvaj konstruoj. Bedaŭrinde, ĉiuj surteraj konstruaĵoj de la maŭzoleo detruiĝis en antikvaj militoj.

Kian sorton do havis ĝia subtera palaco? Historia libro diras, ke en la subtera palaco estas rangosignoj de korteganoj kaj multaj raraj trezoroj. Tie "hidrargo estas uzata kiel riveroj kaj maroj" kaj "troveblas artaj firmamento kaj tersurfaco". Por gardi la maŭzoleon kontraŭ ŝtelado, saĝaj konstruistoj laŭordone faris sekretan meĥanismon. Se ŝtelisto alproksimiĝas, la meĥanismo tuj pafas sagojn kontraŭ lin.

*Riparitaj bronzaj ĉaro kaj ĉevaloj*



La maŭzoleo meritas esti la plej riĉa muzeo de Ĉin-dinastio (221 a. K. — 207 a. K.). Tamen famaj historiistoj pensis, ke jam ruiniĝis la subtera palaco de tiu maŭzoleo. "Ŝi Ĝji" verkita de historiisto Sima Ĉjan en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p. K.) kaj "Han Ŝu" verkita de historiisto Ban Gu en la Orienta Han-dinastio (25—220 p. K.) notis, ke en la lastaj jaroj de Ĉin-dinastio gvidanto de kamparanaj ribeluloj Ŝjang Ju prifosis la maŭzoleon de la Unua Imperiestro de la dinastio. "Han Ŝu" rakontas, kiel paŝtisteto misiris en la fositan tombon kaj senatente forbruligis la subteran palacon.

## MIRINDAJ ELTROVOJ

Neatendite en la 70-aj jaroj de tiu ĉi jarcento oni rimarkis ion mirindan ĉe la forbruligita subtera palaco.

Marte de 1974, kiam kamparanoj boris puton en sia vilaĝo Ŝjijang, kie situas la maŭzoleo, ili elterigis iujn malhele brunajn pecojn de argilaĵoj, kio vekis atenton de arkeologoj de Ŝenŝji-provinco. Kaj post tio komenciĝis granda arkeologia prifosado. En la dua duono de tiu jaro oni trovis en la loko 1.5 kilometrojn oriente de la maŭzoleo tri grandajn kavojn kun areo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj. Tie la pli ol 100 militĉaroj, pli ol 600 argilaj ĉevaloj kaj pli ol 7 000 argilaj soldatoj kaj generaloj admirigis la rigardantojn kaj skuis la mondon.

Post kvar jaroj arkeologoj elfosis en la loko pli ol 20 metrojn okcidente de la maŭzoleo du pompajn farbitajn bronzajn ĉarojn kaj jungitajn ĉevalojn kun duona grandeco de vera ĉevalo.

Poste ili trovis apud la kavo de kaleŝoj subteran deklivan koridoron 16 metrojn larĝan kondukantan al la profundaĵo de la tombo. La koridoro estis ŝtopita per ramita miksita tero de kvin koloroj, kio estas karakteriza trajto de Ĉin-dinastio. Ĝi etendiĝas paralele kun la ruino de la okcidenta pordego de la interna urbo sur la tero.

La novaj eltrovoj vekis jenajn demandojn:

Ĉu la miloj da argilaj militistoj kaj ĉevaloj estas la "gvardio" de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio?

Ĉu la pompaj bronzaj ĉaroj kaj ĉevaloj estas faritaj speciale por la imperiestro?

Ĉu la subtera koridoro okcidente de la maŭzoleo estas la okcidenta enirejo de la subtera palaco?

Kial la argilaj militistoj kaj ĉevaloj restus sendifektaj, se la subtera palaco estus bruligita kaj prifosita?

Tiuj demandoj urĝis la arkeologojn detale esplori la tombon. Ili faris kelkdek milojn da truoj ĉe la tombo por ĝin esplori. Ili trovis la jenon:

La subtera palaco en formo de ortangulo, kun longo de ĉ. 460 metroj de sudo ĝis nordo kaj larĝo de ĉ. 400 metroj de oriento ĝis okcidento, estas pli granda ol la tombo ĉe la bazo;

La subtera palaco estas ĉirkaŭigita per muro. La muro je ĉ. kvar metroj dika estas masonita el nigraj brikoj kun kurbliniaj desegnoj kaj preskaŭ ne difektita;

Ne nur ambaŭflanke, sed ankaŭ oriente kaj norde de la maŭzoleo estas koridoroj kondukantaj al la subtera palaco. La koridoroj estis ŝtopitaj per ramita miksita pulvoreca tero de kvin koloroj kaj oni ne rimarkis signojn de homa detruado;

Estas po unu truo farita de ŝtelisto maksimume naŭ metrojn profunda kaj unu metron larĝa ĉe la orienta kaj okcidenta flankoj de la maŭzoleo. Oni konstatis, ke la truoj estis faritaj en Song-dinastio (960-1279) kaj neniu ŝtelisto sukcesis eĉ atingi la muron de la subtera palaco.

Sciencistoj ne malstreĉis sian laboron por taksi la kvanton de hidrargo en la tombo kaj per tio pruvi la verecon de la noto en la historia libro, ke en la tombo "hidrargo estas uzata kiel riveroj kaj maroj". Ili trovis anormale fortan indikon de ekzisto de hidrargo en la mezo de la subtera palaco, dissemita en areo de 12 000 kvadrataj metroj. Tie la tero entenas hidrargon 280-oble pli multe ol la aliaj tertavoloj. La densa distribuo de hidrargo formas regulajn geometriajn figurojn. Tiel multe da hidrargo ne estas propra al la tomba tero, sed enverŝita de homoj kaj poste volatiliĝinta en la tero. Oni opinias, ke se la subtera palaco estus tro priŝtelita kaj forbruligita, ne eblus tia regula distribuo de hidrargo.


MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

**Petu inform-materialon de:**

**MONATO**, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

La arkeologiaj eltrovoj montras, ke la subtera palaco ankoraŭ restas sendifekta.

## GRANDA TREZOREJO DE HISTORIAJ OBJEKTOJ

Antaŭ la oficiala prifosado de la maŭzoleo ni povas nur imagi la fizionomion de la subtera palaco laŭ historiaj materialoj:

En la subtera palaco estis tri fontoj. Oni fosis teron ĝis ili kaj blokis ilian fluon per marmoro. Sur la volbo de la subtera palaco videblas la brilaj astroj faritaj el perloj. Sur la planko de la palaco estas riveroj, montoj kaj administraj distriktoj simbolantaj la vastajn regionojn regatajn de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio post lia unuigo de Ĉinio. La hidrargo en la "riveroj, lagoj kaj maroj" malrapide moviĝas pelate de ia aparato. En la lagoj kaj maroj estas ŝipoj el santala ligno, sovaĝanseroj el oro kaj arĝento kaj testudoj kaj fiŝoj el vitro, kaj en la maroj jadaj elefantoj kaj balenoj. Sur la tero ĉarmas ĉiamverdaj herboj kaj senvelkaj floroj skulptitaj el jado.

La imperiestro kviete kuŝas en bronza ĉerko, kun kapo sur ora kuseno, kun piedoj sur arĝentaj kusenetoj kaj kun trezorujoj en la manoj. La ĉerko estas lakita kaj ĝia kovrilo farita el jado kaj perloj kaj smeralde ornamita. Ĉirkaŭe staras longaj bronzaj lanternoj en formo de homo, kun dugonga graso kiel brulaĵo.

## LA ENIGMO NESOLVITA


El la hodiaŭaj materialoj tamen estas malfacile tiri konvinkan konkludon. Iuj fakuloj prezentis malsaman opinion:

Antaŭe ofte okazis, ke oni sondis kaj esploris tombon kaj trovis neniun signon de ŝtelado, sed kiam oni prifosis la tombon, oni trovis truojn de ŝtelistoj. Ke la subtera palaco indikas riĉan hidrargan ekziston, tion kaŭzis ne certe la vaporiĝo de la enverŝita hidrargo. Ankaŭ el cinabro, uzata en Ĉin-dinastio kontraŭ putro, povas estiĝi hidrarga vaporo, kiam leviĝas la temperaturo de tero. Tial ne estas elokventa la aserto pri sendifektiĝo de la subtera palaco pro abundeco de hidrargo.

Unu el la gvidantoj de la maŭzolea konstruado estis generalo Ĝang Han de Ĉin-dinastio. Ekzistis granda ebleco, ke li post la kapitulaco al Ĉu-regno malkaŝis al Ŝjang Ju la sekreton de la subtera palaco, kaj Ŝjang Ju povis facile prifosi la tombon. Dume preskaŭ ĉiuj imperiestraj maŭzoleoj en Ŝenŝji estis priŝtelitaj; oni ne kredas, ke la okulfrapa maŭzoleo de la Unua Imperiestro sola povis eviti la malfeliĉon. Kaj la aŭtoroj de "Ŝi Ĝji" kaj "Han Ŝu" estas famaj pro la seriozeco kaj fidindeco en sia verkado. Sen sufiĉa bazo oni ne devas facilanime nei iliajn notojn.

Estas neevitebla la malkonkordo de opinioj antaŭ la solvo de la enigmo. Tamen estas bone, ke proksimiĝas la tago de solvo de tiu historia enigmo.

*Modelo de la subtera palaco farita laŭ materialoj de esplorado*



(*Daŭrigo de p. 48*)

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 03 | Flugo de Pekino al Dalian |
| 08 04 | En Dalian |
| 08 05 | Flugo de Dalian al Shenyang |
| 08 06 | En Shenyang |
| 08 07 | Trajne de Shenyang al Harbino |
| 08 08-09 | En Harbin |
| 08 10 | Flugo de Harbin al Pekino |
| 08 11 | Eliro el Pekino |

Dalian estas unu el la ĉefaj havenoj de Ĉinio. Ĉirkaŭate de la maro triflanke kaj fermite de montetoj en la alia, Dalian havas mildan klimaton kaj belan pejzaĝon kaj estas ideala loko por turismi kaj ferii. Shenyang estas la ĉefurbo de Liaoning-provinco kaj ankaŭ la plej granda urbo kaj trafika nodo en nordorienta Ĉinio. La Palaca Muzeo de Shenyang ĝuas preskaŭ egalan popularecon kiel la Imperiestra Palaco en Pekino. Harbin estas la ĉefurbo de Heilongjiang-provinco kaj loko de natura kaj artefarita beleco.

**PE-5** Pekino — Wuhan — Yangzi-rivero — Chongqing — Guangzhou — Hongkongo

Daŭro: 12 tagoj

Prezo: 2125 guldenoj

Transporto: aviadilo, luksa ŝipo, trajno, buso

Limnombro: minimume 10, maksimume 80

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 04 | Flugo de Pekino al Wuhan |
| 08 05-06 | En Wuhan |
| 08 07 | Enŝipiĝo en la ŝipon "Emei" |
| 08 08-10 | Ŝipvojaĝo al Chongqing laŭ Yangzi-rivero |
| 08 11 | Alveno al Chongqing |
| 08 12 | En Chongqing |
| 08 13 | Flugo de Chongqing al Guangzhou |
| 08 14 | En Guangzhou |
| 08 15 | Trajne de Guangzhou al Hongkongo (ĈITS liveros bileton) |

Pri la detaloj de tiu ĉi ekskurso, bonvolu legi AE-1.

**PE-6** Pekino — Chengde — Pekino

Daŭro: 4 tagoj

Prezo: 420 guldenoj

Transporto: trajno, buso

Limnombro minimume 10, maksimume 50

Itinero:

| | |
|---|---|
| 08 03 | Trajne de Pekino al Chengde |
| 08 04 | En Chengde |
| 08 05 | Trajne de Chengde al Pekino |
| 08 06 | Eliro el Pekino |

Chengde situas 250 kilometrojn norde de Pekino kaj estas ĉirkaŭita de montaroj. Tie la vidindejo nomata "Someruma Montvilao" estis la palaco de la imperiestra familio de Qing-dinastio (1644-1911) por eskapi el la somera varmego. La palaco estas ĉirkaŭita de muro kun longeco de pli ol dek kilometroj. Famas ankaŭ la Ok Temploj ekster la somerumejo sur la deklivoj de la apudaj montetoj, kiuj montras ĉefe lamaismajn trajtojn kaj ankaŭ portas la Han-naciecan stilon.

**Respondo por "Pripensu" 1:**

La surdulo la unua eksciis la pafon, ĉar la lumrapido estas la plej granda; la lamulo la dua pro la dua rapideco de kuglo; kaj la blindulo la tria pro la tria rapideco de sono.

**Solvo por "Pripensu" 2:**



**Solvoj por la enigmoj:**

1. Biciklo aŭ motorciklo
2. Vortaro

## KRESKIS MALPEZ-INDUSTRIAJ PRODUKTAĴOJ DE ĈINIO


En 1985 multe kreskis la vaste postulataj malpez-industriaj produktaĵoj de Ĉinio. El la 35 specoj de produktaĵoj ekzamenataj de la ŝtato la produktokvanto de 24 specoj estis antaŭdate plenumitaj laŭ la jarplano. La jarplano pri bicikloj, horloĝoj, televidiloj, koloraj televidiloj kaj magnetofonoj estis antaŭtempe plenumita, kies produktokvanto superis tiun en la tuta jaro de 1984.

En 1984 malrapide disvolviĝis tekstila industrio, tamen antaŭ decembro de 1985 ĝi tendencis al nova disvolviĝo. La jara produktokvanto de kotonaj fadenoj kaj ŝtofoj, kemiaj fibroj, silkoj, silkaĵoj, lanŝtofoj kaj aliaj 4 ĉefaj produktaĵoj estas plenumita antaŭ decembro. Ili kreskis 4.3-35.3 pocentojn.

Kompare rapide disvolviĝis ankaŭ la manĝaĵ-industrio. Multe pliproduktiĝis biero, ladmanĝaĵoj, laktaĵoj kaj gustoesencoj kaj aliaj kompare kun tiuj en 1984.

## LA ELEKTROPRODUKTO DE ĈINIO LEVIĜIS AL LA 5-A LOKO DE LA MONDO

Unu el la gravaj konstruaj projektoj de Ĉinio en 1985, 5 000 000-kilovattaj generatoroj estis lanĉitaj al uzado, sekve de tio en la 6-a Kvinjara Plano (1981-1985) la elektra kapacito de Ĉinio kreskis je 16.13 milionoj da kilovattoj, t.e. je 3 milionoj da kilovattoj pli multe ol tiu difinita en la plano. En 1985 Ĉinio entute produktis 406 miliardojn da kWh, 31.4 miliardojn da kWh pli multe ol en 1984, kio kreis rekordon en la elektroproduktado de post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Nun Ĉinio okupas la 5-an lokon de la mondo en la elektroproduktado.



*Elektrejo de Ningbo*

## EKIPAĴKOMPLETO POR KURTA POLIESTERA FIBRO DE ĈINIO ATINGIS MONDAN NIVELON

Kompleto de ekipaĵoj por kurta poliestera fibro, kies jara produktokvanto atingis 15 milojn da tunoj, projektita kaj farita de Ĉinio mem en 4 jaroj, sukcese trapasis la ŝtatan ekspertizon decembre de la pasinta jaro en Ŝanhajo.

La ekipaĵ-kompleto konsistas el 141 maŝinoj de 73 specoj. En la grandeco ĝi atingis la plej altan nivelon de la mondo. La kompleto funkcias aŭtomate kaj kontinue. Tiaj ekipaĵoj povas esti farataj nun nur en kelkaj evoluintaj landoj. Tiuj 6 produktaj linioj de la ekipaĵ-kompleto estis sukcese muntitaj en la Dua Poliestera Fabriko sub la Ŝanhaja Ĝenerala Petrolkemia Fabriko kaj komencis produktadon unu post alia. En 1985 ili produktis sume pli ol 60 milojn da tunoj da poliesteraj kurtaj fibroj. La produktaĵoj fabrikitaj el tiuj fibroj estas vendataj en la ĉinaj, eŭropaj, usonaj kaj hongkongaj merkatoj.

## PROSPERAS ĈINA TURISMO

Laŭ statistiko en 1985, en la ĉinan teritorion venis 17.7 milionoj da turistoj, je 38% pli multe ol en 1984.

Dank' al praktiko de reformado kaj pordmalferma politiko en la lastaj jaroj Ĉinio donas grandan atenton al la turisma afero, kaj kiel eble plej multe levas sian kapablon en la turisma afero. Nun en Ĉinio funkcias pli ol 500 turismaj hoteloj kun 170 000 litoj kaj proksimume 10 miloj da turismaj aŭtoj. La mond-nivelaj hoteloj konstruitaj per eksterlanda kapitalo ludas sian rolon. Progresis ankaŭ la riparado kaj ekspluato de la pitoreskejoj kaj historiaj lokoj. Aro da historiaj objektoj denove prezentas sian originalan stilon. La nove malfermitaj turismaj lokoj estas tre ŝatataj de la vojaĝantoj.

## 2 500 KM DA ELEKTRAJ FERVOJOJ KONSTRUITAJ EN ĈINIO

En la Sesa Kvinjara Plano Ĉinio

konstruis pli ol 2 500 km. da elektraj fervojoj, je 1 000 km. pli multe ol tiuj en la pasintaj 20 jaroj. Proksimiĝas al la monda nivelo ankaŭ la tekniko kaj ekipaĵoj de la elektraj fervojoj de Ĉinio. En la 60-aj jaroj Ĉinio povis konstrui nur 40 km. da elektraj fervojoj meznombre ĉiujare, sed nun pli ol 500 km. Sole en 1985 1 100 km. da elektraj fervojoj estis lanĉitaj al la trafiko.

*En la hotelo Granda Muro oni ofte preparas tradiciajn ĉinajn pladojn kaj aranĝas diversajn amuzojn por turistoj. La foto montras, ke servistino en vesto de la antikva feino Ĉang'e akceptas gastojn.*



## 32 000 ENTREPRENOJ HAVAS SIAN JURAN KONSILISTON

Rapide disvolviĝas en Ĉinio jurkonsilista laboro en la entreprena administrado. Nun 32 000 entreprenoj en Ĉinio dungis advokaton kiel sian juran konsiliston longatempan.

En sia jura servo por la entreprenoj la konsilistoj krom solvi konfliktojn kaj eldevigi prunton helpas la entreprenan administradon reguligi la internan, eksteran kaj aliajn ekonomiajn rilatojn per juraj rimedoj. Ili ludas rolon en difino de entreprenaj decidoj kaj negocaj intertraktatoj per sia jura konsilado.

## SKISTOSOMOZO LIKVIDITA EN GŬANGDONG KAJ ŜANHAJO

La provinco Gŭangdong kaj urbo Ŝanhajo deklaris decembre de 1985, ke ili likvidis skistosomozon.

En la supre menciitaj du lokoj furiozis skistosomozo. Dank' al ilia 30-jara penema kaj fruktodona laborado ili fine neniigis la malsanon. Multaj skistosomozuloj estas tute resanigitaj kaj la plugbovoj, konstatitaj je skistosomozo, estas kuracataj kaj konvene traktataj.

## LA UNUA "FROSTIGITA ZOO" EN ĈINIO

La unua besto-ĉela provizejo — "frostigita zoo" estas starigita antaŭ nelonge en la Kunming-a Zoologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi estas fondita ĉefe por kolekti kaj konservi la heredaĵajn riĉaĵojn de la bestoj vivantaj en la regiono de Hengdŭanmontaro en sudokcidenta Ĉinio. Per sciencaj rimedoj ĝi frostigas kaj konservas bestajn spermojn, ovojn, zigotojn kaj embriojn. Ĝi liveras materialojn por denove krei la pereintajn bestojn kaj ankaŭ oportunigas studon pri klasifiko de la animaloj, origino de specioj, sistema evoluo, hereda sem-kulturado kaj aliaj gravaj problemoj.

*Asistanto de la ĉina kultura ministro (la dua de dekstre) kaj la ĉeĥoslovaka ambasadoro al Ĉinio (la unua de maldekstre) en la ekspozicio de ĉeĥoslovakaj vitraĵoj*



## EKSPOZICIO DE ĈEĤOSLOVAKAJ VITRAĴOJ EN ĈINIO

Laŭ interkonsento de la ĉina kaj ĉeĥoslovaka registaroj la ĉeĥoslovakaj vitraĵoj estis eksponitaj en Pekino decembre de la lasta jaro.

La eksponitaj vitraĵoj fanditaj kaj smirgitaj de Ĉeĥoslovakio estas elito de ĝiaj nunaj multspecaj vitraĵoj.

## KOLEKTO DE POEMOJ KAJ PENTRAĴOJ DE TAJLANDA PRINCINO SIRINTORN ELDONITA EN ĈINIO

La kolekto de poemoj kaj pentraĵoj de la tajlanda princino Sirintorn — «Kanto de Herbetoj» estas eldonita en Ĉinio.

Antaŭtagmeze de la 20-a de decembro, 1985, okazis ceremonio de librodonaco en Pekino. Ŝiaj poemoj klaraj kaj fluaj kun profunda senco spiras infanajn interesaĵojn pro kio ili estas ŝatataj de ĉinaj geknaboj.

# Ĉinaj pladoj

de NAN ŜAN

La originala kuirarto de la ĉinoj estas konsistiga parto de la valoraj kulturaj heredaĵoj de Ĉinio kaj havas historion de miloj da jaroj.


La ĉinaj pladoj estas divideblaj en kvar kategoriojn laŭ malsamaj gustoj de diversaj lokoj, nome la pladoj de Ŝandong en la baseno de la Flava Rivero, tiuj de Siĉŭan en la baseno de la supra Jangzi-rivero, tiuj de Ĝjangsu kaj Ĉeĝjang en la baseno de la meza kaj malsupra Jangzi-rivero kaj ĉe la sudorienta marbordo kaj tiuj de Gŭangdong en la baseno de la Perla Rivero kaj ĉe la suda marbordo. Oni povas subdividi ilin en ok sistemojn, nome la pladoj de Ŝandong, Hunan, Siĉŭan, Fuĝjan, Gŭangdong, Ĝjangsu, Ĉeĝjang kaj Anhuj. Ĉiu sistemo havas plurajn skolojn. Krome, Ĉinio havas ankaŭ multajn famajn pladojn kortegajn, islamajn kaj vegetarajn. Laŭ nekompleta statistiko la nombro de la ĉinaj pladoj superas 5 000.

La kvar famaj pladoj havas siajn karakterizaĵojn.


La pladoj de Ŝandong kun gusto neforta kaj oleo nemulta karakteriziĝas per aromo, freŝeco, fragileco kaj delikateco. La kuiristoj de la marbordaj urboj Ĉingdaŭ kaj Jantaj de la duoninsulo Ŝandong estas lertaj en preparado de freŝaj marproduktaĵoj. La fritita litorino, vaporkuirita salikoko kaj aliaj estas famaj tradiciaj pladoj. Krome, la Ŝandong-aj kuiristoj estas lertaj ankaŭ en preparado de malgrasa supo kaj lakta supo. La malgrasa supo kun hirunda nesto ofte estas la unua ĉefa plado por festeno kaj tre bonvena.

La pladoj de Siĉŭan famiĝas pro sia sensentiga, pika kaj forta gusto. La klimato en Siĉŭan estas humida, tial la loĝantoj ofte uzas kapsikon, ĉinan pimentan frukton, pipron kaj zingibron en preparado de pladoj. La Siĉŭanaj fiŝaromaj viando-strioj, kokaĵaj kuboj kun arakidaj grajnoj, sengrasa supo kun blankaj orelfungoj, frikasita karaso sensuka, originalgustaj kokaĵaj strioj kaj aliaj ĝuas grandan famon. La pladoj kun spicoj sensentiga, pika, dolĉa, sala, acida kaj aroma havas originalan guston. La lokaj kuiristoj povas fari delikatan toŭfuan pladon kun gustoj sensentiga kaj pika, kiu jam furoras tra la tuta lando. Ĝi estas preparita el toŭfuo, bovaĵo, pulvoro de kapsiko kaj ĉina pimenta frukto post etfajra kaj malrapida kuirado kun malmulta suko, por ke la toŭfuo ne diseriĝu, sed ensorbu

*Kokaĵaj kuboj kun arakidaj grajnoj*



*Penda rostado de pekinaj anasoj*



la guston de la spicoj. Manĝante ĝin eĉ en frosta vintro, oni povas ŝviti kaj ĝui ĝian belan guston.

La kuiristoj de Ĝjangsu- kaj Ĉeĝjang-provincoj estas lertaj en kuirado, stufado kaj frikasado, uzante la originalajn supon kaj sukon kaj la ĉefan materialon kun malmultaj spicoj. Iliaj pladoj estas iom dolĉaj kaj laŭgustaj. La pladoj ŝarkonaĝilo kun kokaĵo, frikasita porkokapo, frikasita porkopiedo, vaporkuirita alozo, vinagre frikasita herba karpo estas frandaj. La frikasita porkokapo estas ordinara plado por ĉinoj, tamen post delikata preparado de loka kuiristo ĝi konservas formon de porka kapo kaj estas aroma, dolĉa kaj tiel plene kuirita, ke oni devas uzi kuleron por manĝi ĝin.

La pladoj de Gŭangdong karakteriziĝas per freŝeco, delikateco kaj agrableco kaj estas farataj ofte per fritado kaj stufado. La kuiristoj uzas diversajn materialojn en preparado, kiaj serpento, feliso, kalorino (*Callorhinus curilensis*) kaj maniso. Serpentaj pladoj estas la plej famaj en Gŭangdong, precipe la drako-tigra plado tre interesas la ĉinajn kaj alilandajn gastojn. La plado estas preparita el tri-specaj serpentoj, leopardo kaj feliso, kun pli ol 20 spicoj post dekoj da labor-procezoj. La aroma plado estas delikata, agrabla, kaj la ĉefa el la ĉasaĵaj pladoj. Ankaŭ stufita porkido, vaporkuirita peklita koko, ostro-oleе stufitaj anaspiedoj, stufita triono (*Trionyx steindachneri*) kun kokaj piedoj estas famaj lokaj pladoj.

Krome, menciindas la pekinaj pladoj, el kiuj la rostita pekina anaso estas la plej fama kaj havas historion de 600 jaroj. La fama restoracio Ĉjŭanĝjude fondita en 1864 servas per bone rostitaj anasoj. Oni havas tri metodojn de rostado, nome rostado per ferma forno, surforka rostado kaj penda rostado per forno. La anasoj rostitaj per tiu lasta metodo ĝuas la plej grandan famon. La pekinaj anasoj post purigo, haŭto-brogo, suker-tegado kaj aerumado devas esti pendigitaj en forno kun temperaturo de 230°-250°C por 40-minuta rostado. La preparitaj anasoj estas brile karmezinaj kaj bongustaj kun fragila haŭto. Dum la manĝado oni envolvas distranĉitan anasaĵon laŭplaĉe kun ŝenoprazo kaj dolĉa saŭco en bakitan maldikan molan farunaĵon. La manĝaĵo estas tre bongusta.

Ankaŭ la kortegaj pladoj kaj brogita ŝafaĵo estas famaj en Pekino. La antaŭaj estis delikate preparitaj el valoraj materialoj, kiaj urso-piedo, cervaĵo, hirunda nesto, ŝarkonaĝilo, holoturio, speciale por feŭdaj imperiestroj kaj iliaj edzinoj. Nun oni povas ĝui tiajn pladojn en Fangŝan-restoracio de Bejhaj-parko kaj en Tingligŭan-restoracio de la Somera Palaco. Por ĝui brogitan ŝafaĵon, oni uzas surtabligeblan kupran forneton. Oni devas unue meti distranĉitan ŝafaĵon en la bolantan akvon de la forneto kaj kirli ĝin, kaj poste elakvigi kaj trempi ĝin en spicaĵo. Tiam oni povas manĝi. Tia manĝmaniero havas historion de pli ol mil jaroj. Pasintece ĝi estis bona vintra plado en imperiestra palaco.

Krome, la islamaj kaj vegetaraj pladoj estas preparitaj por islamanoj, budhanoj kaj taoistoj. Por fari vegetarajn pladojn, oni uzas diversajn sojfabajn produktaĵojn kaj agarikon, orelfungon, bambuidon, brasikon kaj vegetalinon. Sen viando kaj fiŝo la pladoj tamen estas frandaj kaj bonvenaj al maljunuloj kaj malsanuloj.



*Pretigado de pladoj*



*En kuirejo*

Por veki apetiton kaj ĝuigi la kuirarton, diverstempaj ĉinaj kuiristoj tre atentis la koloron, aromon, guston kaj formon de la pladoj. La bonodoraj manĝaĵoj en fajnaj ĉinaj porcelanaj vazoj tiklas la nazon. Ili estas kvazaŭ belartaĵoj.

Oni povas frandi malsamajn famajn pladojn en diversaj lokoj de Ĉinio. Ne estas senkaŭze, ke multaj alilandaj amikoj vizitintaj Ĉinion diras, ke "ĉinaj manĝaĵoj estas preferindaj."

POR VIA SANO

# Ok sanigaj ekzercoj (II)


Ĉ. Brustofrotado. Premu la dekstran supron de la brusto per la dekstra manplato kun la fingroj kunigitaj kaj direktitaj malsupren. Forte movu la manplaton ĝis la maldekstra ingveno kaj poste faru la samon per la maldekstra manplato de la maldekstra brustosupro ĝis la dekstra ingveno. Tion ripetu dekkelkajn fojojn alterne per la dekstra kaj maldekstra manoj (Bildoj 9 kaj 10).

La brustofrotado preventas kaj kuracas trakeiton kaj sanigas la koron kaj pulmojn.

D. Gambofrotado. Ĉirkaŭprenu gambon ĉe ĝia supra fino per ambaŭ manoj kaj forte movu ilin malsupren ĝis la maleolo (frotante kruron, movu la dikfingrojn laŭ ambaŭ flankoj antaŭe de la tibioj kun la ceteraj fingropintoj unuj kontraŭ la aliaj), kaj poste inverse. Faru tion 10-20 fojojn. (Ĉiu fojo inkluzivas unu frotadon supren kaj unu frotadon malsupren.) En la sama maniero frotu ambaŭ gambojn (Bildo 11). Se vi sentas malkomforton, frotu la femuron kaj kruron respektive.


La gambofrotado povas vigligi la artikojn, fortigi la gamban muskolon kaj estas efika por preventi la gambajn malsanojn kaj levi la piediran povon.

E. Genufrotado. Premu genuon per ambaŭ manplatoj. Frotu ĝin unue eksteren dekkelkajn fojojn kaj poste internen dekkelkajn fojojn ĝis ĝia varmiĝo kaj ruĝiĝo (Bildo 12). Se vi sentas malkomforton, knedu la maldekstran genuon per ambaŭ manoj dekojn da fojoj kaj tion faru same al la dekstra genuo. Ankaŭ tio estas tre efika.




Ofta frotado kaj knedado de la genuoj povas varmigi la genuojn, kuraci genuajn afekciojn kaŭzitajn de malvarmo kaj vigligi la genuan funkcion. Ili estas efikaj por preventi artriton kaj aliajn malfacile kuraceblajn malsanojn.

*(Daŭrigota)*



KARIKATURO


*Heredo*

de **FA NAJGŬANG**

## AMUZO

### EGALA FELIĈO (HUMURAĴO)

Iu bienulo aĉetis pecon da porkoviando kaj donis ĝin al sia dungito, ke li portu. Neatendite, la viandon forkaptis senhejma hundo. La bienulo ordonis al la dungito repreni la viandon. La dungito diris: "Mastro, ni dungitoj tutan jaron ne havas okazon ĝui porkaĵon, do por kio vi domaĝas perdi ĝin eĉ unu fojon?" La bienulo koleris: "Vi ne havas okazon, ĉar mankas al vi feliĉo!" La dungito ridis: "Laŭ vi, la hundo havas egalan feliĉon kiel vi!"



### ANKAŬ DUONON (HUMURAĴO)

Edzo: "Mia kara, via plado ne estas sufiĉe kuirita!"

Ekzino: "Mi ĝin preparis laŭ recepto, kiu diras, ke por fari la pladon necesas 500 gramoj da materialo. Mi uzis duonon de la dirita kvanto kaj ankaŭ duonon de la tempo por kuiri."

### PRIPENSU!

1. Kiu la unua eksciis la pafon?

Iun vesperon blindulo, surdulo kaj lamulo estis trinkantaj teon sur herbejo. Subite kuglo flugis preter orelon de la lamulo.

La blindulo diris: "Miaj oreloj estas la plej akraj, kaj mi la unua eksciis la pafon."

La surdulo diris: "Ne, ne! Mi vidis la eksplodfajron, do mi eksciis la unua."

La lamulo diris: "La kuglo flugis preter mian orelon, do mi eksciis la unua."

Ĉu vi povas juĝi, kiu el ili la unua eksciis la pafon, kiu la dua, kaj kiu la lasta?

(Respondo trovebla en ĉi numero)

2. Sep bestoj estas en cirko. Faru tri rektajn liniojn por apartigi ilin unu de alia.



(Solvo trovebla en ĉi numero)

### ENIGMOJ:


1. Estas du fratoj kun sama alteco. Tuj sur vojo ili vetkuras. Kun sama rapideco ili kuras. Neniu iam kuratingos la alian.

(Trafikilo)

2. Instruisto ĉiam silentas, kvankam multscia. Se vi ne komprenas ion, tuj konsultu lin. (Referenca libro)

(Solvoj troveblaj en ĉi numero)

## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. *Pekino*
2. *Ŝjian*
3. *Kantono*
4. *Tibeto*
5. *Ĉengdu*
6. *Ĝuhaj*
7. *Ĉjŭanĝoŭ*

**Historia Dramo**

# BRONZA TIGRO



La bronza tigro estis aŭtentikiga objekto pri komandpovo super armeo en la antikveco de Ĉinio.

La dramo temas pri la evento "ŝteli la bronzan tigron por savi la regnon Ĝaŭ", registrita en historiaj libroj de Ĉinio.

En 262 a.k. okazis batalo inter regnoj Ĉin kaj Ĝaŭ, pli ol 400 mil soldatoj de Ĝaŭ estis mortigitaj kaj la ĉefurbo estis en danĝero. Ĝaŭ petis helpon de la regno Ŭej. Timante atakon de Ĉin la reĝo de Ŭej rifuzis la peton. Sed Princo Ŝinling, duonfrato de la reĝo, dank' al helpo de Ĵuĝji, kromedzino de la reĝo, sukcesis ŝteli la bronzan tigron por manovrigi la armeon, kaj sekve li eldanĝerigis Ĝaŭ.

La aŭtoro Gŭo Moĵŭo (1892-1978) estis eminenta ĉina verkisto, poeto, historiisto, dramisto, arkeologo, paleografo kaj fama socia aktivulo. En 1921 lia unua poemaro "Diino" aperis kaj per tio li fariĝis pioniro de la moderna poezio de Ĉinio. Li verkis "Bronza Tigro" en 1942, ĝuste en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, por veki ĉe la popolo patriotismon kaj batalvolon. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, li funkciis kiel prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj prezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj. Li estis produktiva, kaj liaj ĉefaj verkoj jam kolektiĝis en la 17 volumoj de "Verkoj de Gŭo Moĵŭo", kelkaj el liaj verkoj jam havas plurajn fremdlingvajn versiojn kaj riĉigas la mondan literaturon.

**Formato:** 148 × 210 mm 138pĝ.

**Prezo:** £ 2,90 US$ 5,90

**Numero:** 10-Es-1954S

**Mendu ĉe:** Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# 第 二 十 二 课
# Dudekdua Leciono
## 会 场
## *Kongresejo*

**Ofte uzataj vortoj**

| | | |
|---|---|---|
| 什么时间开会 | **shénme shí jiān kāihuì** | kiam okazos la kongreso |
| 会场在哪里 | **huìchǎng zài nǎli** | kie estas la kongresejo |
| 从这里怎么去 | **cóng zhèli zěnme qù** | kiel iri al ĝi de ĉi tie |
| 坐出租汽车去 | **zuò chūzū qìchē qù** | veturi per taksio |

**Dialogo**

A: 先生，请问世界语大会什么时间开？
**A: Xiānsheng, qǐngwèn Shìjièjǔ Dàhuì shénme shíjiān kāi?**
sinjor-, bonvol- demand- Esperant- kongres- kiu temp- okaz-
A: Pardonon, sinjoro, kiam okazos UK?
B: 明天上午九点钟。
**B: Míngtiān shàngwǔ jiǔdiǎnzhōng.**
morgaŭ antaŭtagmez- naŭ hor-
B: Morgaŭ je la naŭa antaŭtagmeze.
A: 会场在哪里？
**A: Huìchǎng zài nǎli?**
kongresej- kie
A: Kie estas la kongresejo?
B: 在友谊宾馆科学会堂。
**B: Zài Yǒuyì Bīnguǎn Kēxué Huìtáng.**
en amikec- hotel- scienc- hal-
B: En la Scienca Halo de la hotelo Amikeco.

A: 从这里怎么去？
**A: Cóng zhèilǐ zěnme qù?**
de ĉi tie kiel ir-
A: Kiel iri al ĝi de ĉi tie?
B: 您可以从门口乘坐出租汽车去。
**B: Nín kěyǐ cóng ménkǒu chéngzuò chūzū qìchē qù.**
vi pov- de pordeg- vetur- taksi- ir-
B: Vi povas veturi de la pordego per taksio.
A: 谢谢。
**A: Xièxie.**
dank-
A: Dankon.
B: 不用谢。
**B: Bùyòng xiè.**
ne dank-
B: Ne dankinde.

**Klarigoj:**

1. 在哪里：在 estas uzata ĉi tie kiel verbo, kun la senco "ekzisti".
2. 从这里走：从 estas uzata antaŭ la vortoj signifantaj lokon aŭ pozicion por montri deirpunkton.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

* La Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esp.-Asocio (IP TEA) kunlaboranta asocio de UEA, intencas aranĝi en la kadro de la Universala Kongreso en Pekino dum 1986 sian laŭvican ĉefkunvenon. Tiuj, kiuj interesiĝas pri IPTEA, aŭ dez. aliĝi al ĝi, povas skribi al: s-ro Roger Colney, ĝen. sekr. de IPTEA, B.P.126, F-05004 GAP cedex, France.

* 15-j. Dienes Anna (gimnazilernantino) dez. kor. kun knab(in)oj (14-18 jaraj), Baross Utca 12 A, Hasdunanas-4080, Hungario.

* S-ro Nsimea-Dikita, C o La Verda-Stelo, B.P. 122 Kwilu-Ngongo (B.Z.), Zairio, dez. kor. kun geamikoj el Ĉinio kaj Japanio pri sporto.

* Zulia Esperanto-Ligo (ZEL), kiu publikigas trimonatan bultenon, volas interŝanĝi similajn esp.-publikaĵojn. Estas bonvenaj la leteroj kiuj deziras korespondi kun niaj komencantoj. Adreso: ZEL, apartado 15250, Mara caibo, Venezuelo.

* S-ino Wieslawa Wegrzyk (25j.), ul. Dr. Adamskiego 17A, 44-270 Bybnik 10, Pollando, deziras korespondi tutmonde.

* Anoj de pola E-Klubo serĉas korespondkontaktojn. Ĉefaj hobioj: turismo, fotado, muziko. Eblas interŝanĝo de vizitoj. Respondo certa. Pola Esperanto-Asocio Klubo "100", Pl-67-240 Kotla 168, Pollando.

* Grupeto de danaj fervojistoj intencas vojaĝi tra Ĉinio post la UK en Beijing. Ni veturos trajne, kaj vizitos la urbojn: Ŝjian, Ĉengdu, Kunming, Ŝanhajo, Uhan kaj Kantono. Ni volas kontaktiĝi kun lokaj esp-istoj, precipe kun kolegoj. Skribu al s-ino Astrid Birkbak, la sekr-ino de Dana Esp-ista Fervojista Asocio, Rugvenget 46, 2750 Ballerup, Danio.

* Mi interesiĝas pri korespondo, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, radio, muziko, ktp. 17-j. f-ino Sofia Lundgren, Soldatvagen 9, S-186 00 Vallentuna, Svedio.

* 26-jara fraŭlo deziras korespondi tutmonde pri ĉ.t. Mi kolektas pm. kaj pk. Mia adreso: Khosrow Mahdjubian, P.O.Box 44715-1156, Langerud-Gilan, Iran.

* 19-jara Sablik Andreo, 32-650 Kety, Os 700-lecia 19m4, Pollando, interesiĝas pri Tajĝiĉjŭan.

* 63-jara s-ino Britta Hjelmberg, Ektorpsgatan 164, S-60354 Norrkoping, Svedio, vol. havi leteramikojn el Ĉinio. pri historio, lingvoj kaj literaturo.

* 16-jara lernantino Zsigmond Beata, Cart, Bucin 4.A 20, 4200 Gheorgheni, Harghita, Rumanio, vol. kor. tutm. pri ĉ.t..

* 15-j. lernanto dez. kor. tutmonde, kolektas pm., bk. kaj monerojn alilandajn. Rene Griese 2723 Warin, Seeblick 6, DDR.

* 60-jara dentkuracisto, d-ro Otto Daumer, 5900 Eisenach/DDR, Bockel-Str.7, deziras korespondi kun ĉina esperantist(in)o pri fakaj aŭ aliaj interesoj.

* Esperantista ekskolektanto proponas pm: 75 malsamajn belajn francajn kaj 25 alilandajn kontraŭ 5 irk. Mendu ĉe s-ro Rouget, Ecole Louise Laurent, 14400 Bayeux, Francio.

* S-ino Ann Gerd Engberg (57j. flegistino), Ljunggatan 16B, 60236 Norruoping, Svedio, volas korespondi kun komencantoj speciale el Pollando, Ĉinio, Britio pri muziko, libroj kaj sporto.

# Kolorigita argila dancisto

Teksto de **FANG GŬOĜIN** Foto de **HU ĈUJ**

La argila dancisto altas 47 centimetrojn kaj dikas 15 centimetrojn. Liaj zonita robo, alta ĉapo, longaj botoj kaj iom fleksitaj genuoj komike impresas la rigardantojn. La gracia movo kaj esprimplena mieno kvazaŭ vivigis la argilaĵon. Laŭ liaj vestoj kaj aspekto oni povas konstati, ke li prezentas tipan figuron de nacimalplimulto de Ŝinĝjang. La valoran artaĵon oni trovis en la tombo de regnestro Li Ŝeng de la Suda Tang-dinastio (937-975) ĉe Zutang-monto en Nankino, Ĝjangsu-provinco, kaj konservas en la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino.



*Kolorigita argila dancisto*

